revuo

esperanto

novembro 1965
58-a jaro
n-ro 720 (11)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

ESPERANTO

revuo internacia

Enhavo

181 La Dua Lerneja Konferenco okazos en Graz

182 Pri la agado de la lokaj grupoj:
5. Ekzemplo de modela E-societo (Lapenna)

184 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

185 Duobla jubileo

186 La Lingvo Internacia kaj lingvo uzbeka (Koblov)

188 Recenzoj

191 Ricevitaj eldonaĵoj

192 Kurso per televido
"Tankaoj okcidentaj" (Lobut)
Esperanto en radio

193 Mallongaj novaĵoj

194 Nekrologoj Ezquerra, Boyce, Pinon
Ĉe la tombo de Hideo Yagi
Leteroj

195 51-a Universala Kongreso, Budapest 1966
Belartaj konkursoj 1966
Memoriga kalendaro
21-a IJK de TEJO, Ootu 1965 (fotoj)

196 La Juna Vivo: Seminario pri lingvaj problemoj

197 22-a IJK de TEJO, Pécs 1966

198 Oficiala informilo n-ro 384

200 Anoncetoj

kovrila bildo Plurlingve oni diskutis en la Seminario pri Lingvaj Problemoj, kiun TEJO organizis por ne-esperantistaj organizaĵoj en Ljubljana. Maldekstre la prezidinto, Humphrey Tonkin; dekstre sekretario Svobodan Zlatnar. (Foto: E. Voogd)

bildojn liveris **193** Geroldinger

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
novembro 1965

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la **revuo** Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.· (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

Bankisto de U.E.A.:
R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:
0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.
Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:
Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Post-bus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

LA DUA LERNEJA KONFERENCO OKAZOS EN GRAZ

23 - 28 julio 1966

Kiel konate, la Konsulta Komisiono pri Lernejoj (KKL), formita rezulte de la decidoj de la Beograda Lerneja Konferenco en 1963, klopodis organizi en 1965 la Duan Konferencon de Lernejoj, en kiuj Esperanto Estas Instruata. Pro teknikaj kaŭzoj tiu Konferenco devis esti prokrastita. La KKL tuj komencis esplori la eblecojn okazigi ĝin en iu konvena loko, laŭ ebleco survoje al Budapeŝto, en 1966 antaŭ la Universala Kongreso. En la nomo de la KKL mi traktis la demandon kun la reprezentantoj de la LKK en Budapeŝto, informiĝis persone pri la lokaj kondiĉoj en Linz, Vieno kaj Graz, kaj diskutis la demandon kun la reprezentantoj de ILEI dum ĝia Konferenco, okazinta en Graz la pasintan julion. Rezulte de la menciitaj traktadoj, la KKL, en kiu nun troviĝas ankaŭ f-ino Jeanne Dedieu kiel reprezentantino de ILEI, konkludis, ke la plej taŭga loko por la Dua Lerneja Konferenco estas Graz.

Ideala konferencejo

La urbo mem estas ĉarma kaj alloga, je ne granda distanco de Budapeŝto. La Studenta Hejmo, kie okazos la Konferenco, estas absolute ideala por tiaspeca renkontiĝo. Ĝi havas grandan halon por la kunsidoj de la Pleno, taŭgajn ejojn por kunvenoj de malgrandaj komitatoj, pli ol 300 plej modernajn kaj komfortajn unulitajn ĉambrojn, kie povos loĝi la konferencanoj. La prezoj estas vere moderaj. En Graz troviĝas vigla loka Esperanto-grupo, kiu kun granda simpatio rilatas al la okazigo de la Konferenco en tiu urbo.

La Dua Lerneja Konferenco okazos de la 23-a ĝis la 28-a de julio. La programon prizorgas la KKL, sed pri la tuta teknika-organiza flanko respondecas la Loka Konferenca Komitato (LKK), kiu estas jam formita sub la prezido de s-ro J. Wesian kaj energie komencis la laboron. La Konferenco estos sub aŭspicioj de UEA, ILEI kaj, se iel eble, de la Aŭstria Nacia Unesko-Komisiono.

Tri kategorioj de partoprenantoj

Kiel planite por la Londona Konferenco kaj interkonsentite kun la LKK en Graz, estos tri grupoj de partoprenantoj: (a) oficialaj reprezentantoj de lernejoj, inkluzive de universitatoj, en kiuj Esperanto estas instruata; (b) individuaj instruistoj, kiuj instruas la lingvon en la lernejoj; (c) instruistoj-esperantistoj, kiuj ne instruas Esperanton en la lernejoj, kaj ĉiuj aliaj personoj kiuj interesiĝas pri la instruado de la lingvo ĉu en la lernejoj, ĉu ekster ili, kiel observantoj. (Vidu la aliĝilon, aldonitan al tiu ĉi numero de "Esperanto"). La KKL opinias, ke estas tre utile grupigi la konferencanojn en apartaj komisionoj por pritrakti la specifajn aspektojn de Esperantoinstruado en la universitatoj, porinstruistaj lernejoj, popolaj altlernejoj, teknikaj aŭ komercaj aŭ aliaj specialaj lernejoj, duagradaj lernejoj, elementaj kaj blindulaj lernejoj. Tio ebligos ne nur pli proksimajn kontaktojn inter la geinstruistoj de difinitaj tipoj de lernejoj, sed ankaŭ faciligos la pritrakton de la problemoj.

Aliflanke, ekzistas demandoj, kiuj interesas ĉiujn konferencanojn kaj kiuj devas esti traktataj en la Pleno. Tial la KKL decidis, ke el la 4 vere laboraj tagoj de la Konferenco, lundo estu dediĉita al la kunsidoj de la Pleno kun raportoj de ĝenerala intereso, mardo kaj merkredo al la laboro de la komisionoj laŭ la supraj kategorioj, ĵaŭdo denove al la Pleno por aŭdi la konkludojn de la komisionoj kaj formuli la ĝeneralan Rezolucion. Sabato, la 23-a de julio estas antaŭvidita por la gazetara konferenco, dum en la vespero estos la inaŭguro. Dimanĉon matene la Konferenco elektos la prezidantaron kaj solvos ĉiujn teknikajn demandojn por glata evoluo de la laboroj. Se necese, dimanĉo posttagmeze povos esti utiligita por la unua kunsido de la Pleno.

La definitiva programo estos fiksita en decembro de tiu ĉi jaro. Tamen, jam nun oni povas diri, ke kelkaj el la ĝeneralaj raportoj, prezentotaj al la kunsidoj de la Pleno, rilatos al (a) decidoj de la Beograda Konferenco, formiĝo de la KKL kaj ĝia laboro; (b) la asociiĝintaj lernejoj de Unesko kaj la ebla rolo de la Internacia Lingvo; (c) la eduka valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj; (ĉ) aŭdovidaj metodoj en la instruado de lingvoj kun aparta atento al instruado de Esperanto; (d) problemoj de Esperanta fonetiko; (e) la rolo de TEJO en la lernejo; (f) la rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj.

La komisionoj aparte pritraktos la problemojn de Esperanto-instruado en specifaj tipoj de lernejoj, prenante en konsideron la ideojn prezentitajn en la ĝeneralaj raportoj. Ĉiu el tiuj komisionoj havos sian raportanton, kiu prezentos la plej efikajn metodojn por la instruado de Esperanto en la konkreta tipo de lernejoj, la problemojn renkontatajn, la disponeblajn lernolibrojn, la internaciajn ligojn de la gelernantoj kaj aliajn demandojn.

La KKL kaj LKK atendas multnombran partoprenon. En la Studenta Hejmo jam estas rezervitaj 160 ĉambroj kaj la LKK povas garantii loĝigon tie nur al la unuaj 160 aliĝintoj. Estas do en la intereso de ĉiuj, kiuj deziras partopreni en la Konferenco, aliĝi kiel eble plej baldaŭ. La KKL kaj LKK faros ĉion eblan, por ke la programo, inkluzive la distrajn aranĝojn, estu kiel eble plej altnivela, sed nur multnombra partopreno de ĉiuj interesitoj povas garantii plenan sukceson de la Konferenco, kiu devas signi plian grandan paŝon antaŭen sur la kampo de instruado de Esperanto en la lernejoj.

Prof. d-ro Ivo Lapenna

artikolserio:

PRI LA AGADO DE LA LOKAJ GRUPOJ

5: EKZEMPLO DE MODELA ESPERANTO-SOCIETO

Omaĝe al la iamaj membroj de Akademia Esperanto-Klubo

La antaŭaj kontribuoj en la artikolserio pri la agado de la lokaj grupoj akcentis la unuarangan gravecon de niaj bazaj organizaĵoj por la tuta Esperanto-Movado kaj pritraktis diversajn aspektojn de ilia laboro. Venis nun la momento por koncize prezenti en tiu ĉi konkluda artikolo konkretan ekzemplon de efika agado de unu el tiaj grupoj, por ke la aliaj povu ĉerpi ideojn por sia propra laboro.

Por tiu celo mi elektis la agadon de Akademia Esperanto-Klubo (AEK) en Zagreb, kiu funkciis ekde marto 1929 ĝis la invado de la naziaj trupoj en Jugoslavion la 6-an de aprilo 1941. Mi elektis ĝuste ĝin ne nur tial, ĉar el ĉ. 300 Esperanto-societoj, pri kies laboro mi havis la okazon persone informiĝi dum miaj prelegvojaĝoj kaj alicelaj vizitoj al diversaj lokoj de multaj landoj, tiu klubo sendube devas esti konsiderata kiel unu el la plej modelaj, sed ankaŭ tial, ĉar ĝia multflanka aktivado estas al mi plej bone konata.

Kontraŭ la venton....

En sia Historio de Esperanto-Movado en Jugoslavio (Zagreb 1965), Marinko Gjivoje skribas interalie:

"Kiam per la Reĝa Akto de la 6-a de januaro 1929 komenciĝis diktatora reĝimo en Jugoslavio, plioftiĝis la fermado de Esperantistaj organizaĵoj kaj la suspektado kaj persekutado de E-funkciuloj. En tiaj cirkonstancoj fine de 1929 ekmutis 'Konkordo'... Kvankam oni povis konstati ian stagnon en nia Movado, ĝi ne daŭris longe, ĉar — kiel kutime — ĉiun defluon sekvas afluo. En marto 1929 Ivo Godek kaj Ivo Lapenna, studentoj de la Zagreba Universitato, apenaŭ fininte la mezlernejon, fondis en Zagreb Studentan Esperantistan Klubon, kiu havis la taskon propagandi Esperanton inter la studentaro de la Zagreba Universitato.... Tiu klubo ludis tre gravan rolon en nia Movado."[1])

La diktaturo, en pli aŭ malpli akra formo, daŭris ĝis la kolapso de la antaŭmilita Jugoslavio en aprilo 1941, do dum la tuta ekzistoperiodo de la Klubo. La vento, kiu ekblovis la 6-an de januaro 1929, certe ne estis favora por kiu ajn progresema ideo. Necesis agi kontraŭ ĝin. En la posta periodo, kiam la Klubo fortikiĝis kaj ĝiaj membroj preskaŭ ĉiudimanĉe ekskursis al proksima monto kaj aliaj lokoj, ili kutimis kanti melodion, tiam tre popularan, en kies rekantaĵo ripete aperis la vortoj "ni marŝas kontraŭ la venton". Multrilate tiu kanto simbolis la agadon de la Klubo, kiun markis senĉesa venkado de ĉiaspecaj malfacilaĵoj.

En marto 1929 Ivo Godek, al kiu ĝis hodiaŭ min ligas sentoj de profunda amikeco, estis la sola membro, kiu flue parolis la lingvon. Mi estis komencanto. La deko da aliaj nur "decidis lerni ĝin"! Kiam ni du, en julio de la sama jaro, veturis al Zidani Most por partopreni la konferencon de Jugoslavia Esperanto-Ligo (kiun ĉeestis la reprezentantoj de la 5-6 tiam ekzistantaj societoj), neniu venis eĉ al la ideo — mi mem malpli al ĉiuj — ke pro mi aŭ alia komencanto oni devus paroli nacilingve: aŭ silentu, aŭ parolu la lingvon, kiun vi deziras disvastigi. Kaj ĝis hodiaŭ mi bone memoras kiel en la vagonaro, kun la vortaro en la manoj, mi preparis la kelkajn frazojn, kiujn mi intencis diri. Ĝi fariĝis mia senkondiĉa principo: en Esperanto-organizaĵoj oni devas paroli nur la Internacian Lingvon.

La komencaj financaj rimedoj estis preskaŭ nulaj: etaj kotizoj de kelkaj membroj. La kunvenejo: diversaj kafejoj, kie ĉe taso da kafo ni komencis praktikadi la lingvon diskutante en ĝi la problemojn de nia agado en tre malfacilaj cirkonstancoj de politika diktaturo kaj ĝenerala regreso — ne nur stagno — de la tuta Movado en Jugoslavio. D-ro Leo Kun, la prezidanto de la Kvina Jugoslavia Esperanto-Kongreso, okazinta fine, post multaj jaroj sen landa kongreso, en Slavonski Brod en 1933, karakterizis tiun periodon jene:

"Ĝis nia Broda Kongreso ne ekzistis vera movado, sed nur parolo pri kelkaj 'famuloj', pri kiuj oni ĉie aŭdis. Mi mem vidis unu jaron antaŭ la Kongreso 'statistikon' pri nia Movado: sur papereto manskribita staris kelkaj ciferoj, pri kiuj hontus eĉ Eskimoj."[2])

En tiaj kondiĉoj agis kaj progresis Studenta Esperantista Klubo.

De sukceso al sukceso

En 1929, dum la Universala Kongreso en Budapeŝto, ĝiaj reprezentantoj iniciatis la fondon de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO). La subskribinto estis elektita prezidanto de la nova organizaĵo kaj Ivo Godek ĝia se-

[1]) M. Gjivoje, Historio de Esperanto-Movado en Jugoslavio, Zagreb, 1965, p. 20.

[2]) La Suda Stelo, n-ro 5, 1933 laŭ M. Gjivoje, Historio, p. 63.

kretario. En 1931 la Dua Kunveno de Studentoj, dum la Krakova Kongreso, komisiis la Zagreban Klubon funkcii kiel Centro de ĉiuj studentaj Esperanto-organizaĵoj. Tiun taskon ĝi plenumis ĝis 1941. En 1934 estis ŝanĝita la Statuto kaj la nomo de la Klubo al Akademia Esperanto-Klubo. La nova Statuto ebligis aliĝon ne nur al studentoj, sed ankaŭ, unuflanke, al mezgradaj gelernantoj kaj, aliflanke, al ĉiuj kiuj finis universitatajn studojn. Tio donis al la Klubo plian svingon. En sia jam menciita verko Marinko Gjivoje skribas:

"En la unuaj jaroj laboris nur la komitatanoj, kiel okazas en preskaŭ ĉiuj societoj. Poste oni disdividis la laboron ankaŭ inter la nekomitatanoj kaj oni laboris laŭplane kaj laŭ bona programo. Unu zorgis pri la klubaj aranĝoj, alia pri la kursoj, tria pri la kluba kaso, kvara pri disvendado de 'La Suda Stelo', kvina pri propagando en nacilingvaj gazetoj ktp. La anoj de AEK prelegis publike en Zagreb kaj en la provinco, skribis ĉefajn artikolojn en la konataj progresemaj gazetoj kaj revuoj *Književnik, NIN, Pregled, Savremeni Pogledi, Izraz* ktp., malfermis multnombrajn kursojn por la junularo kaj aparte en sindikatoj. En tiu laboro apartajn meritojn akiris D-ro Ivo Lapenna, A. Š. Turković, D. Puhalo, J. Grandja, Inĝ. B. Borjan, E. Lapenna, A. Mussi k.a. La kursojn de AEK ĉiam vizitis 60-70 personoj (en la unuaj jaroj maksimume 25), la klubaranĝojn 60-80, kaj la Zamenhof-vesperojn 100 aŭ eĉ pli multaj."[3])

M. Gjivoje daŭrigas:

"Gravaj sukcesoj estis atingitaj ankaŭ koncerne la eldonan aktivecon. La Klubo eldonis en la jaro 1935 la nacilingvan broŝuron de D-ro Lapenna 'Medjunarodni Jezik u Historiji i Danas' (La Lingvo Internacia en la Historio kaj Hodiaŭ) [4]) en 6000 ekz., kiu ege kontribuis al la kompreno de la problemo de la internacia lingvo.

Ĝi rapide disvendiĝis. En aprilo 1938 aperis la lernolibro 'Esperanto en Dek Lecionoj' de la sama aŭtoro, en 2000 ekzempleroj, kaj la tuta kvanto elĉerpiĝis antaŭ la forpaso de unu jaro. Pro tio la Klubo eldonis en 1939 la duan eldonon de la lernolibro en pli granda kvanto. Krom tio la Klubo eldonis diversajn propagandajn poŝtkartojn, poemojn, flugfoliojn ktp." [5])

La agado de la Klubo sentiĝis ĉiam pli tra tuta Jugoslavio. Ne nur pro la eldonaĵoj kaj multnombraj artikoloj, kiuj estis regule publikigataj en la taggazetoj kaj en la plej altnivelaj tiamaj kulturaj revuoj de Jugoslavio, sed ankaŭ tial, ĉar multaj membroj, fininte siajn studojn, ekloĝis en aliaj lokoj kaj tie ekagis. Malnovaj Esperanto-societoj revigliĝis, novaj estis fonditaj. Kaj kvankam la tiama polico ofte dissolvis Esperanto-societojn en diversaj lokoj, tamen la tuta Movado senĉese vastiĝis kaj fortikiĝis. En Zagreb mem, antaŭ la malpermeso de la Laborista Esperanto-Societo fare de la polico, funkciis 5 grupoj, el kiuj 3 havis propraj societejojn[6]), kun entute pli ol 800 pagantaj membroj. Por urbo de iom pli ol 300.000 loĝantoj tio verŝajne estas rekordo en la tuta historio de la Esperanto-Movado.

Okaze de la jubilea Deka Jugoslavia Esperanto-Kongreso en Zagreb (1937), kiun ĉeestis pli ol 500 reprezentantoj de lokaj grupoj el tuta Jugoslavio, estis elektita nova Estraro de Jugoslavia Esperanto-Ligo sub la prezidanteco de la subskribinto kaj konsistanta ĉefe el la membroj de AEK. En la sama jaro la subskribinto fariĝis komitatano de Internacia Esperanto-Ligo kun sidejo en Britujo (poste UEA) kaj en 1938 li estis elektita estrarano.

En 1941, senpere antaŭ la perforta ĉesigo de la laboro de AEK pro la nazia invado, la Klubo havis preskaŭ 200 membrojn. Al tio oni devas aldoni la membrojn aŭ la aliajn personojn, kiuj ellernis la lingvon en la kursoj de AEK, sed kiuj pro profesiaj kaŭzoj ekloĝis en aliaj urboj kaj membriĝis en tieaj societoj. En tiu fina periodo AEK havis propran luitan klubejon, propran meblaron kaj oficejan ilaron, grandan bibliotekon, legejon kun multaj gazetoj kaj revuoj. Krome ĝi luis grandan kaj tre komfortan salonon en la strikta centro de la urbo por la regulaj semajnaj kunvenoj kaj por la kursoj. La interna vivo estis plena de juneca dinamismo. Ekstere, la agado de la Klubo forte influis ne nur la tutan karakteron de la Jugoslavia Esperanto-Movado, sed ankaŭ la publikan opinion de Jugoslavio, kio siavice fekundigis la grundon por plua agado. Pluraj ideoj, forĝitaj en la multnombraj diskutoj en AEK, komencis penetradi en la Esperanto-Movadon ankaŭ ekster la limoj de Jugoslavio. Kvankam la milito detruis la Klubon kaj multaj ĝiaj membroj pereis aŭ suferis kruelaĵojn, tamen la efiko de ĝia laboro sentiĝis ankaŭ post la milito. La postvivintaj membroj de AEK, kune kun aliaj esperantistoj en Zagreb, fondis en tiu urbo la unuan novan lokan grupon en Jugoslavio — la nunan Esperanto-Societon "Bude Borjan" — kaj la landan asocion. En la lastaj jaroj 5 komitatanoj de UEA — E. Lapenna, Prof. Inĝ. O. Pancer, Prof. Inĝ. M. Saponjić, Lic. T. Sekelj kaj la subskribinto — estis iam membroj de AEK. Ankaŭ la fondinto kaj nuna direktoro de la Internacia Arta Teatro, S. Flego, apartenis al ĝi.

Ivo Lapenna

(Daŭrigota en la decembra "Esperanto")

---

[3]) M. Gjivoje, Historio, p. 63.

[4]) Bazita sur prelego farita en la sama jaro en la Popola Universitato al ĉ. 300 personoj (rim. de I.L.).

[5]) Alia grava verketo, eldonita de la Klubo, estis "Engleski ili Esperanto?" (La angla aŭ Esperanto?). Ankaŭ ĝi multe kontribuis al la disvastigo de la lingvo.

[6]) AEK, la Zagreba Esperanto-Societo kaj la Laborista Esperanto-Societo. En tuta Okcidenta Eŭropo mi trovis nur 4 lokajn grupojn (Malmö, Milano, Linz kaj Romans) kun propraj ejoj, sed eble estas ankaŭ aliaj.

DUONVOJE AL UNU MILIONO

Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

la jaro de internacia kunlaboro, jaro de la int. lingvo esperanto



Subskribis la antaŭa ĉefministro nov-zelanda, Sir Walter Nash

Preciza kalkulo en la fino de septembro montris, ke ĝis tiam atingis la Centran Oficejon 283 898 individuaj subskriboj el 52 landoj, kaj subskriboj de 1496 organizaĵoj en 29 landoj kun pli ol 43 200 000 membroj. Se oni aldonas la anoncitajn, sed ankoraŭ ne ricevitajn subskribojn kolektitajn de Oomoto en Japanujo, la monda sumo post la unua semajno de oktobro devas esti minimume **440 000 individuoj kaj 1500 organizaĵoj kun pli ol 44 milionoj da membroj.**

Ni urĝe alvokas al ĉiuj kolektantoj kaj perantoj, nepre tuj sendi al la C.O. ĉiujn subskribofoliojn, ĉu tute aŭ nur parte plenigitajn. Ĉiuj subskriboj devas atingi Rotterdam plej malfrue la 31an de decembro.

Lastatempe subskribis pluraj gravaj organizaĵoj en Argentino, precipe diversaj kooperativoj. El ili la Federacio Argentina de Elektro-Kooperativoj havas 531 000 membrojn. Inter la individuoj elstaras d-ro Adhemar Pereira de Barros, guberniestro de la ŝtato São Paulo; R. M. Findlay, antaŭe estro de la Laborista Partio en Nov-Zelando; Antonio Maria Kardinalo Barbieri, ĉefepiskopo de Montevideo; s-ro Pak Young Joon, prezidanto de la Korea Elektra Kompanio; Hugh McDiarmid, konata skota poeto. La nombro de membroj de registaroj atingis jam 55; tiu de parlamentanoj: 425, kaj tiu de urbestroj: 150.

Kelkaj kolektantoj laboregis

Jam pli frue ni menciis kelkajn kunlaborantojn, kiuj donis vere bonegan ekzemplon de tio, kion oni povas atingi per entuziasma varbado. La rekordulo ŝajnas esti ankoraŭ s-ro Molnár László (Hungarujo), kiu persone kolektis jam 7735 individuajn subskribojn. Pli ol 1000 kolektis s-roj Karl Friedl (Aŭstrujo), Paulo Amorim Cardoso (Brazilo) kaj Sztankó István (Hungarujo).

En Francujo inĝ. G. Rougetet, komisiite de UFE, sendis personan peton al ĉiuj francaj deputitoj, senatanoj, akademianoj kaj aliaj altranguloj (entute ĉ. 2000 personoj), kun subskribo-folio kaj informilo pri Esperanto. Tia iniciato estas aparte imitinda, ĉar la kolektado permesas — tion ĉiuj aktivaj kolektantoj konstatis — facile penetri en mediojn, kiuj alie estus fermitaj al ni. Ankoraŭ estas tempo por ke aliaj landaj asocioj agu simile. Alvenis ankaŭ informo, ke la franca fervojista Esperanto-organizaĵo sendos similajn petojn al kvincent ĉefoj de la Francaj Fervojoj.

Peticio al la Japana Parlamento

Samtempe kun sia senrivala kampanjo por la Propono al U.N., Japana E-Instituto kaj Oomoto en intima kunlaboro varbis subskribojn por aparta peticio al la Japana Parlamento, en kiu oni petas devigan instruadon de la Internacia Lingvo en Japanujo. Ĝis la komenco de aŭgusto estis jam ricevitaj pli ol kvarona miliono da subskriboj ankaŭ por tiu afero.

Nun jam sin turni al la gazetaro

Daŭre alvenas al la C.O. informoj pri publikigoj pri la Propono en la ne-Esperanta gazetaro. En Nov-Zelando, ekzemple, aperis longaj, dukolumnaj artikoloj kun la teksto de la Propono en pluraj gazetoj kaj ĵurnaloj. Nun, kiam la nombroj tiel de individuaj kiel de kolektivaj subskriboj atingis atentindan grandecon, la momento estas sufiĉe matura por lanĉi kampanjon en la gazetaro de ĉiu lando. Tiurilate ĉiu povas proponi sian kunlaboron al la landa Informa Fako (Jarlibro p. 36-7) aŭ, se tia ne ekzistas ankoraŭ, proprainiciate sendi informojn kaj artikolojn al la gazetaro.

Monako sendis pli, ol Norvegujo!

Komparo inter la 52 landoj, kiuj ĝis nun sendis subskribojn al la C.O. en Rotterdam, donas kelkajn surprizojn. Grandaj landoj kiel Sovetunio kaj Usono kontribuis multe malpli — pro eksteraj kaŭzoj — ol iuj malgrandaj. Sed ankaŭ landoj kun nova aŭ nenia landa Esperanto-organizaĵo (Koreujo, Kubo, Kolombio, Hindujo) ĝis nun superis iujn landojn kun malnova organizo (Norvegujo, Islando).

En "Esperanto" de septembro-oktobro (p. 176) ni montris tabele, kiuj landoj plej bone kontribuis **proporcie** al sia loĝantaro. Bedaŭrinde la premo de post-kongresa laboro kaŭzis, ke aperis tie kelkaj eraroj. Jen la (korektita) stato je la fino de septembro:

	Lando	Subs.	Loĝ.	‰
1.	Monako	333	0,022	15,14
2.	Bulgarujo	71 765	8,1	8,86
3.	Hungarujo	29 963	10	3,00
4.	Belgujo	16 174	9,3	1,74
5.	Aŭstrujo	8 492	7,1	1,20
6.	Islando	204	0,19	1,07
7.	Ĉeĥoslovakujo	12 535	14	0,90
8.	Nederlando	9 045	12	0,75
9.	Finnlando	3 312	4,6	0,72
10.	Jugoslavio	12 665	19	0,66

Sekvas: Danlando, Svedujo, Malto, Israelo, Svislando, Francujo, Germanujo, ktp. ktp. Japanujo okupus nun la kvinan lokon, se la subskriboj kolektitaj de Oomoto jam antaŭe atingus la Centran Oficejon. Klariga ekzemplo: en Hungarujo, lando de 10 milionoj da loĝantoj, oni kolektis 29 963 individuajn subskribojn; do subskribis proksimume 3 personoj en ĉiu milo.

DUOBLA JUBILEO

Andreo Cseh kaj Internacia Esperanto-Instituto

Pro la 70-a datreveno de la naskiĝo de S-ro Andreo Cseh kaj pro la 35-jara ekzistado de la Internacia Esperanto-Instituto (antaŭe Internacia Cseh-Instituto) okazis la 11-an de septembro granda festo en unu el la plej elegantaj salonoj en Hago. Malgranda jubilea komitato jam antaŭe diskonigis la planojn, tiel ke gratuloj kaj bondeziroj alfluis el ĉiuj anguloj de la mondo.



Andreo Cseh en la tempo de la fondiĝo de Internacia Esperanto-Instituto.

Ŝlosila instrumetodo

Netakseblaj estas la meritoj de Andreo Cseh por la tutmonda Esperanto-Movado, pro la unika instrumetodo kiun li ellaboris kaj kiu montriĝis ŝlosilo por popularigi la lingvon. Miloj da homoj en la tuta mondo dankas sian esperantistecon al li, ĉu rekte, ĉu pere de aliaj Cseh-metodaj instruistoj. Siatempe, la metodo estis efektive unika, pionira. Nur poste oni multe ĝin imitis, ŝanĝetis - ankaŭ fuŝis. Nur poste ankaŭ por aliaj lingvoj aperis metodoj bazitaj sur similaj principoj, sub plej diversaj nomoj, por popularigi la lingvolernadon, kaj nun jam estas modo logi la publikon per negramatikaj, amuzaj, konversaciaj kursoj. El tio montriĝas kiel modernaj kaj klarvidaj estis la konceptoj de Andreo Cseh antaŭ 35 jaroj.

La iama Esperanto-Domo en Arnhem, Nederlando — centro de multaj kursoj kaj konferencoj en la antaŭmilita periodo.

Post la milito Andreo Cseh estis kunfondinto kaj iniciatinto de Universala Ligo, kies celo estas mondfederalismo kaj kies oficiala lingvo estas Esperanto. Unu el la plej grandaj meritoj de U.L. estas la starigo de la stelosistemo, la internacia monunuo, kies elpensinto estis Andreo Cseh.

La Instituto floris antaŭ la milito, kiam ĝi edukis aron da diversnaciaj Cseh-metodaj instruistoj kaj dissendis ilin tra la mondo por kursgvidado. Apenaŭ imagebla estas la riĉega rikolto, kiun estus doninta tiu ĉi sistemo, se ĝi estus povinta plue disvolviĝi kaj ne estus detruita pro la eksplodo de la dua mondmilito. Same floranta antaŭmilite kaj same detruita estis la Esperanto-Domo en Arnhem, kiun fondis, estris kaj mastrumis la Instituto. Krom tio, la Instituto eldonis la revuon La Praktiko, tre taŭga legaĵo por kursfinintoj, kaj ankaŭ cetere montris valoran eldonan aktivecon.

En la festo ĉeestis pluraj eminentaj personoj, inter kiuj unualoke estas menciinda la iama multjara ĉefministro nederlanda, D-ro W. Drees, kiu malgraŭ sia alta aĝo partoprenis la feston de sia instruinto - ĉar ankaŭ li iam estis kursano de Andreo Cseh. Festparoladon faris Tiberio Morariu el Svedujo, rumandevena, multjara kunlaborinto kaj unua Cseh-metoda instruisto sendita al eksterlando. En la nomo de UEA ĉeestis kaj gratulis estrarano E. J. Woessink el Arnhem, dum inter la sennombraj telegramoj estis tiu de la prezidanto.

Pasas la jaroj, pliaĝiĝas la homoj, ŝanĝiĝas la cirkonstancoj. S-ro Cseh liberigis sin de kelkaj laboroj. La eldonado de La Praktiko transiris al UEA, la redaktado al S-ino Burgler, sed ankoraŭ li estras la Instituton kaj administras Universalan Ligon. Forton kaj sanon ni deziras al li por tiuj ankoraŭ sufiĉe ampleksaj taskoj.



K. Koblov

LA LINGVO INTERNACIA

Kesarj S. Koblov, aŭtoro de la tria studo en nia serio, gvidas la katedron de la rusa lingvo en unu el la ĉefaj altlernejoj de Taŝkent. Li estas la aŭtoro de pli ol 50 publikigitaj lingvistikaj studoj.

La Esperanta vortaro konsistas grandparte el radikoj komunaj al la plimulto de eŭropaj lingvoj. Tial ĉiu mezklera eŭropano, sen ia ajn antaŭa studado, anticipe konas 50-80 % de la Esperanta radikaro. La gramatiko de Esperanto estas ankaŭ tre simpla por la eŭropanoj, ĉar ĝi prezentas sciencan sintezon de simpligitaj gramatikaj reguloj de okcidenteŭropaj lingvoj. Pro tio oni tute prave asertas, ke la Internacia Lingvo estas la plej facila el ĉiuj vivantaj lingvoj.

Konsiderante la facilecon de Esperanto por la roman-ĝermanaj kaj parte por la slavaj popoloj, kelkiuj dubas pri la facileco de Esperanto por la ekstereŭropanoj kaj opinias, ke la Lingvo Internacia por ili estas same malfacila, kiel ĉiuj eŭropaj lingvoj.

Ĉu tiu ĉi opinio estas prava? Ĉu Esperanto efektive estas malfacila por neeŭropaj popoloj, kaj ekzemple, por turklingvaj popoloj? Antaŭ al doni respondon, ni provu ekzameni la problemon, komparante Esperanton kun unu el la turkaj lingvoj nome la uzbeka.

La familio de turkaj (turk-tataraj) lingvoj konsistas nun el pli ol 25 "vivantaj" lingvoj, proksime parencaj unu al la alia. La deveno de unu komuna fonto kaŭzis similecon de iliaj gramatikoj kaj vortaroj. Dank'al tio, preskaŭ ĉiuj turklingvanoj estas reciproke interkomprenataj.

En Soveta Unio loĝas pli ol 25 turklingvaj popoloj, kies nombro de parolantoj superas 23 milionojn. La plej multnombraj el ili estas: uzbekoj — 6.004.000; tataroj — 4.969.000; kazaĥoj — 3.581.000; azerbajĝanoj — 2.929.000; ĉuvaŝoj — 1.470.000; turkmenoj — 1.004.000. En aliaj landoj (Turkujo, Okcidenta Ĉinujo, Irano, Afganistano), ankaŭ loĝas turklingvaj popoloj, kies loĝantaro atingas 28.000.000 da homoj.

Nun ni konatiĝu elemente kun la lingvo de la uzbeka popolo. La vortaro de la moderna literatura uzbeka enhavas 15-20 % da internaciaj vortradikoj. Jen estas kelkaj ekzemploj*): agent, bakterija, vitamin, gripp, demokrat, zoolog, institut, kapron, laboratorija, matematika, negativ, politika, respublika, sinus, transport, universitet, festival, ktp, ktp. Precipe multaj internaciaj vortoj estas renkontataj en literaturo scienca kaj politika. Lasteldonitaj uzbeka-rusaj vortaroj enhavas ĝenerale 40 milojn da vortoj. Sekve, 6-8 miloj el ili estas internaciaj kaj proksimaj al vortoj esperantaj.

Alfabeto kaj strukturo

La uzbeka alfabeto konsistas el 35 literoj, grafike similaj al la alfabeto rusa. Ĉiu Esperanta sono (vokalo kaj konsonanto) havas sian ekvivalenton en la moderna uzbeka lingvo. Eĉ "ĝ", "ĥ", "h" kaj "ŭ". Ĉiun apartan sonon en la vorto montras unu aparta litero. La akcento troviĝas preskaŭ senescepte sur la lasta silabo.

La morfologia strukturo de la uzbeka lingvo estas tre parenca al tiu de Esperanto. Ambaŭ lingvoj estas aglutinaj. Vortkonstruo okazas per simpla kunmeto de neŝanĝeblaj vortelementoj (radikoj kaj sufiksoj): IŜ-laboro; IŜ+ĈI-labor+ist+o; IŜ+ĈI+LAR = labor+ist+o+j; IŜ+ĈI+LAR+NI = labor+ist+o+j+n.

La uzbekaj sufiksoj, same kiel la Esperantaj, havas ĉiam konstantan signifon: *ĈA = et:* UJ = domo; UJ+ĈA = dom+et+o; KITOB = libro; KITOB+ĈA = libr+et+o. *ĈI = ist:* ETIK = ŝuo; TIK+ĈI = ŝu+ist+o; ĤIZMAT = ofico; ĤIZMAT+ĈI = ofic+ist+o. *DON = uj:* SIJOĤ = inko, SIJOĤ+DON = ink+uj+o; TUZ = salo, TUZ+DON = sal+uj+o.

Gramatika genro ne ekzistas en la uzbeka lingvo. Same kiel en Esperanto, libro, kajero, tablo, benko kaj aliaj senvivaj objektoj ne havas sekson.

La pluralo de substantivoj estas ĉiam montrata per sufikso = LAR: ODAM-homo, ODAM +LAR = homo+j; DARAHT = arbo, DARAHT+LAR = arbo+j.

Deklinacio de substantivoj okazas ankaŭ pere de konstantaj sufiksoj:

Kazo	Sufikso	Ekzemploj
Nominativo	—	ota(patro), kitob(libro).
Genitivo	= ning	otaning, kitobning.
Dativo	= ga	otaga, kitobga.
Akuzativo	= ni	otani, kitobni.
"Loka"kazo	= da	otada (ĉe patro), kitobda (en libro).
"Elira"kazo	= dan	otadan (de patro), kitobdan (el libro).

*) La uzbekaj vortoj ĉie en la artikolo estas transskribitaj per Esperantaj literoj.

KAJ LINGVO UZBEKA

Uzbekaj maljunuloj ĉe tetrinkado

Adjektiva kaj numeraloj, situantaj antaŭ la substantivoj, dum deklinado restas senŝanĝaj.

En la uzbeka lingvo forestas prepozicioj. Ilin anstataŭas "postpozicioj" kaj kazaj sufiksoj:

AL	DOMO = UJ	OLDIGA
ANTAŬ		OLDIDA
SUPER		USTIDA
SUB		OSTIDA
EN		= DA
EL		= DAN

La formoj de la verbo en la uzbeka estas sufiĉe multnombraj kaj kapablas esprimi la plej delikatajn nuancojn de la penso. Ekzistas ĉiuj tempoj, modoj, voĉoj kaj aspektoj, kiujn posedas Esperanto. La prezencoj estas tri, preteritoj — ok kaj futuroj — tri.

Jena tabelo montras la participajn formojn de la verbo "JOZMOK" (skribi).

Tempoj	Aktivo	Pasivo
Prezenco	Joz+a+digan	joz+il+a+digan
	joz+a+jot+gan	joz+il+a+jot+gan
Prèterito	joz+gan	joz+il+gan
Futuro	joz+ar	joz+il+ar
	joz+a+ĝak	joz+il+a+ĝak

Difinita vortordo en uzbeka frazo sufiĉe diferencas de la vortordo libera en Esperanto. En la Lingvo Internacia ne ekzistas ja specialaj vortordreguloj, kaj oni devas klopodi nur pri la klareco kaj bonsoneco. Sed en la uzbeka lingvo ĉiu frazelemento havas sian konstantan lokon en la frazo. Ekzemple, la predikato en frazo ĉiam okupas la plej lastan lokon: "MEN HAT *JOZAMAN*" (Mi leteron *skribas).* La nerekta objekto staras antaŭ la rekta kaj la lasta situas antaŭ la predikato: "MEN DUSTIMGA HAT JOZDIM" (Mi al amiko leteron skribas). La epiteto ĉiam lokiĝas antaŭ la substantivo: (JANGI JIL-nova jaro).

La akcentado de diversaj frazelementoj okazas jenmaniere: la logike akcentatan frazelementon oni metas antaŭ la predikato. Ekzemple: "Hodiaŭ teatron mi *kun patro* vizitos" (ne kun patrino!). "Mi hodiaŭ kun patro *teatron* vizitos" (ne kinejon). "Hodiaŭ kun patro teatron *mi* vizitos" (ne vi!). Kaj tiel plu.

Pro manko de spaco en tiu ĉi artikolo mi ne povas kompari la strukturon de kompleksaj frazoj, kun diversaj propozicioj, en la uzbeka lingvo kaj en Esperanto.

Nun eblas klare respondi je la demando starigita en la komenco de tiu ĉi artikolo: "Ĉu Esperanto efektive estas malfacila por turklingvaj popoloj?"

Ekzameninte la problemon, ni povas tute juste konstati, ke nek vortaro, nek fonetiko, nek gramatiko Esperanta prezentas al turklingvanoj iujn apartajn malfacilaĵojn, pli pezajn, ol al la popoloj parolantaj eŭropajn lingvojn.

LA PLEZURO RELEGI LA FABELOJN DE ANDERSEN

* *Ricevebla ĉe UEA*

Fabeloj de H. C. Andersen. Tradukis d-ro L. L. Zamenhof. 1a Vol., dua eldono. Heroldo, Bruselo, 1965. 237 p. 21 × 15 cm., il. Prezo: 11,50 gld. (46 st).*

Esperanto alportas al ni plurajn kromplezurojn, inter ili tiun, ke en plenkreska aĝo ni relegas la fabelojn de H.C.A. Ĉe ĉiu legado pligrandiĝas mia admiro por la dana geniulo, kiu miaopinie rajtas stari apud la plej grandaj verkistoj de ĉiuj landoj. Ĉi tiuj per sia imagpovo plejparte rekreis materialon liveritan de la historio aŭ la mitologio; Andersen plejparte kreis el la nulo, t.e. ĝuste lia imagpovo liveris al li la materialon.

Al ĉi tiu plezuro multon aldonas la plaĉa aspekto de la nuna dua eldono, riĉigita per la 53 ilustraĵoj de A. Uniechowski, kies neimitebla stilo plene kaptas la spiriton de la teksto. (21 preseraroj, tamen; el kiuj gravas 18/15 (legu *da;* kp. unuan eld. kaj 17/-7); 34/3 *(la* antaŭ *lito*); 38/-10 (estis); 92/-10 (esti); 42/18 (vitro); 44/8 kaj 48/-8 (forflugis); 44/-2 (ĝin); 63/18 (la); 78/16 elfalis *kune* post *estu*); 83/-14 (pri kiuj); 101/12 *(kune rompadis* devus esti unu vorto); 216/11 *(el la);* kaj kvankam la du eraroj de p. 127 de la Ia eld. estas korektitaj, restas ĉe 100/16 eraraj citiloj ambaŭflanke de *li diris.*

Pro la longa intervalo inter recenz-peto kaj alveno de la libro mi havis la tempon lerni la danan gramatikon kaj akiri danan eldonon, do povis kontentigi longdaŭran scivolemon pri la ekzakteco de la Esperanta traduko (farita, kiel konate, laŭ germana traduko). Ĝi ŝajnas al mi tre ekzakta, - certe tre supera al tiu angla kiun mi havas, ne nur laŭ korekteco, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi pli bone kaptas la etoson de la originalo. (La angla eĉ purigas (!) la tekston: ekz. la vojkamarado ne vipis la reĝinon; la sorĉistino ne manĝegadis serpentojn, sed karesis bufon; la vestaĵoj de la knabinoj ne estis travideblaj; la reĝido ne kisis la feinon sur la buŝo; eĉ la trompita reĝo surhavas subĉemizon, kiel cetere ankaŭ ĉe la dana!).

Restas spaco por 100 vortoj, do telegraf-stile: 8/15 *belegaĵoj:* amuzejoj? 11/9 *poligona grio:* blanka faruno? 11/10 ald. post *reĝidino: kaj kiam tio estis farita.* 11/17 *ŝutmarkita:* lerte por *kiel la grajnoj faletis laŭ la tuta vojo.* 11/-15 *restigis:* estis forgesinta. 11/-3 D: prenu kru- rojn kun vi. 12/-5 *faris prez.:* t.e. honorsalutis. 23/14 *la:* iu. 25/7 *des pli:* kiom. 25/20 *laŭlarĝe:* de la flanko *(tvaers over;* kp. anglan *athwart*); 36/11 *fumista s-ro:* kio estas tiu *røgmand?* (A: nutcrackers!). 48/5 tie*n* en... lumo*n* (kp. -8). 54/5 *en... klimaton:* D: al Danlando. 62/-10 *transatendi:* lerte por *atendi ĝis... pasos.* 84/3 dua *sur:* en. 93/10 *piedoj* (!): kruroj. 156/-2 sen *la* antaŭ *stana.* 174/17... viandon *: *elprenis la kadavrojn kaj manĝis ilian karnon.* Sufiĉu tio!

D. B. Gregor (Britujo)

* Pri la Zamenhofa uzo de ĉi tiu vorto vidu la 8an eld. de *Hamleto,* p.vi. Sed *karno* eniris Esperanton oficiale nur en 1909.

Internacia elektroteknika vortaro esperanta- pola, angla, franca, germana, itala, sveda. Grupoj 07 (Elektroteknikо) kaj 08 (Elektro- akustiko). Verkis K. Siwicki. Eld. Pola E-Asocio, Varsovio 1965. 171 p. 21 × 15 cm., ofsetita. 3,10 gld.*

La eldono, kun 937 terminoj, estas parto de la kontinua laboro de Scienca Sekcio de PEA ĝisdatigi la Esperantan terminaron de elektro- tekniko iasence postlasitan en la stadio de la ĝeneva eldono en 1938.

Bedaŭrinde ĝi ne povis bazi sin sur nova literaturo de la fako nek konsulto de ISAE, tiel ke fakte validas la averto ke "... estontaj verkistoj kaj legantoj mem decidu ĉu tiuj ĉi terminoj indas al enigo, ĉu al plibonigo aŭ al forĵeto."

La decido inter kunmetita formo kaj aldona adjektivo restas unu el la solvendaj problemoj; la estontaj fakverkistoj do rajtas elekti inter la tri formoj: *detranĉtensio* (de elektrontubo), *tensio joniga* kaj *tensio de ekscito.* La elekto inter malsamaj naciaj esprimoj estas provizore farita, sed ĉu *cirkvito elira* estas preferinda ol *cirkvito elmeta* (Venture: Radio-Terminaro)? *Bildrektifilo* ŝajnas esti pli miskomprenebla ol *video-,* dum la neadopto de *pikupo* (PV, Supl.) povas esti saĝa decido.

Fine, nemalmultaj mistajpoj kaj neklara ofseto estas aliaj problemoj nepre solvendaj por ke la verko estu atente legata kaj utiligata de la fakuloj.

Kenĵi Naemura (Tokio)

Esperanto the Aggressor Language (la lingvo de la agresantoj). Eld. Usona Armeo, Vaŝingtono, 1962. 233 p. 23 × 15 cm. Vortaro angla-Ea kaj Ea-angla kun frazaro. *

Kiel konate, jam de multaj jaroj la Usona Armeo aplikas Esperanton kiel lingvon de la "malamiko" en siaj ekzercaj manovroj. Oni komprenu bone, ke por tiu celo tute ne necesas konformiĝi al normala internacia uzado, ĉar ĉiuj parolantoj estas usonanoj. Tiu ĉi "manlibro" emfazas, ke la uzantoj rajtas modifi la lingvon laŭ lokaj bezonoj. Ne mirinde do, ke la tuto estas plena de usonismoj. Inter la "Oftaj Frazoj por Ĉiutaga Konversacio", ekzemple, oni legas:

"Signala Roto Specialo estas ekipata kun sona ekipaĵo kiu havas kapablo de produktanta sortimento de batala sono por faranta malgranda unito ŝajni granda. Apud, ĝi havas psikologia militado kaj propaganda disvatiga kapablo."

Kuriozaĵo por kolektantoj.

V.S.

LA POEZIO DE SIMPLECO KAJ KVIETO

Sur la vivovojo, versaĵoj de Aleksandro Logvin. Eld. Stafeto, La Laguna, 1964. 115 p. 18 × 12 cm. Beletraj Kajeroj n-ro 24. 4,50 gld. (18 st.)*

A. Logvin naskiĝis en 1903 en Ukrainio. Esperantisto depost 1923. Sub la plumnomo Liljer antaŭ 25-30 jaroj li kontribuis al nia beletro, ĉefe per "Heroldo de Esperanto". Post la granda silento li ekverkis denove per "Norda Prismo". Kaj nun aperas lia poemaro libroforme, kiu montras homon al ni, profunde humanan, parolantan al ni de kor' al koro. El la priskriboj de la naturo li eltiras ĉiam subjektivajn konkludojn, ĝenerale iom melankoliajn. Logvin ne estas patosa altefluga poeto, sed simpla, milda, kvieta. Escepte de du aŭ tri versfinoj truditaj de la rimo, lia poezio fluas tute nature kaj spontane. Plej bone difinas la poeton liaj du versoj:

mia kor' vibranta por la Belo,
por la Libero, Justo, Paco, Ver'

kaj la jenaj du strofoj:

Jes, tia estu nia vivo,
ke nin ne logu falsa fam',
kaj nin impulsu por aktivo
ne la memamo, sed homam'.
Ni gvidu tiel la vivkuron,
ke ni, post nia malaper',
en homaj koroj lasu spuron,
ne sur la flavo de l' paper'.

La tradukoj, kiujn li mem nomas interpretoj, prezentas kelkajn malpli konatajn aŭtorojn, flanke de Lermontov, kaj fermas la libron per ora ŝlosilo: *Kie estis Bastilo* de Evtuŝenko.

Malmultaj preseraroj ne ĝenas la legadon, tamen unu manko enestas, nome de glosaro. Krom neologismoj ofte uzataj en nia beletro estas *neofito, tumulo* kaj *omeno,* ĝenerale komprenataj nur de latinidlingvanoj, kaj *kobzisto,* ŝajne rusa vorto.

L. H. Knoedt (Brazilo)

Panjo, versaĵoj de Jaroslav Seifert. El la ĉeĥa: Jiří Kořínek. Eld. Slovenia E-Ligo, Ljubljana 1960. 77 p. 19 × 13 cm. 2,70 gld. *

Tre malmultaj homoj havas la magian povon, parolante pri sia infanaĝo, akute rememorigi, potence aktualigi al aliaj ilian propran infantempon. Seifert estas unu el tiuj raraj sorĉistoj. Sentoj, sensaĵoj ĉiaj de tiu fora paseo lante elvenas el la nebula iamo per liaj poemoj.

Lia kanto estas intima, sobra, eleganta en sia simpleco; per vortoj ĉiutagaj liaj versoj tamen kortuŝe mildas: ni, eksknaboj, memoru ekzemple pri la pasia globetludado:

ĝi ebriigis kiel vino

jen nia unua libelo, en kvazaŭ ĉina akvarelo:

haltante sur tigo
je ringo ŝanĝas ĝin

jen kara fumo (La pipo de la Paĉjo); jen grandega surprizo: larmoj en Panja rigardo (ĉe la fenestro); jen niaj unuaj antaŭsentoj pri la misteroj de la plenkreskula vivo: amo, sufero, morto (La fraŭlino el la kvara etaĝo)..

En mia nacia lingvo, la franca, Seifert estas ĝis nun konata nur per la traduko, en malmulte disvastigita revuo, de la 13 rondeloj: Mozart en Prago. Kaj kia traduko! senritma, senrima, nurlaŭvorta, kvazaŭ ŝtonamaso anstataŭ palaco. Male, la rekonstruoj de Kořínek estas tiel perfektaj, ke oni kredus ilin originalaĵoj, ne tradukaĵoj. Kiaj subtilaĵoj en la klavaro de tiu majstro! Jen kelkaj agordoj:

tristeco de la plosivoj: *ne plu per blankaj prujnoj ploris*
ĝojkrioj de la vokaloj: *en viv' min multaj rozoj ravis*
pezeco de la nazaloj: *premas min muto de muroj..*

Ni esperantistoj neniam sufiĉe laŭtigos tion: kaj kvante (v. P. 75) kaj kvalite Esperanto foje superas grandajn naciajn kulturlingvojn, kaj ĉi tie ekz. Esperanto pli utilas ol la franca por la kono de unu el la plej famaj ĉeĥaj verkistoj.

Ĉu vi volas retrovi la perditan paradizon de la infanaĝo? Seifert kaj Kořínek proponas al vi la ŝlosilon.

J. L. Tortel (Francujo)

En la plej nova

MONDA KULTURO

(n-ro 12) vi povas legi i.a.:

"Zejnab kaj Aman",
ekstrakto el moderna uzbeka poemo de Alimĵan.
"Ural Tansykbaev, uzbeka pentristo",
artikolo tradukita de P. Poliçuk.
"Kun Waringhien en Tenerifo",
raporto interesega por literaturamantoj.
"Lydia Koidula kaj Fr. R. Kreutzwald",
studo de Hilda Dresen pri estonaj gepoetoj.
"Naiva edzineto",
sceno el komedio de anglo William Wycherley
"Poezio kaj religioj el Afriko",
de Amadou Hampaté Bâ, malia historiisto.
"La miraklo de la figarbo",
franca prozaĵo de Maurice Magre.
"La aventuro de la kriplulo",
el la rakontoj pri Sherlock Holmes.
Krome: rezultoj kaj premiitaj poemoj de la Belartaj Konkursoj, recenzoj, novaĵoj ktp.

---

citaĵoj

New York Times: "La lingvan kaoson surscenigis antaŭ nelonge kortumo en Johannesburg, Sudafriko, kie du interpretistoj devis traduki en la anglan kaj afrikansan la parolojn de kvar akuzitoj pri ŝtelo, kiuj parolis 3 malsamajn indiĝenajn lingvojn. Kiam oni alvokis atestanton, kiu parolis ankoraŭ alian indiĝenan lingvon, la kortumo devis ĉesi; mankis kompetenta interpretisto."

"Sonorilo": "Legante tian libron oni konsciiĝas ke nia literaturo jam havas historion kaj ke ĝi evoluis ĝis la rata nivelo." Verŝajne iu vorto estas muspresita.

"La Ĝusta Vojo": "35 kv. km. distance de Kairo kraŝis nokte en sabla dezerto granda trafik-maŝino..." Eble ĝi klopodis flugi en kvadrata tempo...

KONGRESLANDA POSTRIKOLTO



Yanagita kunio

Japanaj malnovaj rakontoj. Kolektis Yanagita kunio. Trad. kolektivo. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, 1965. 127 p. 19 × 13 cm., koloril. Prezo: 4,50 gld. (18 st.)*

Ekzistas multaj, kiuj posedas la strangan virton, kolekti volumojn de folkloraj fabeloj, ili estu de kiu ajn lando; kaj ju pli ekzotika la fonto kaj speco de novaperintaj rakontoj, des pli allogaj, do havendaj ili fariĝas por siaj adorantoj. La nuna eldonaĵo, el vidpunkto enhava, certe ne malsukcesos kontentigi, kaj provizi distradon el la fantazia mondo de feinoj kaj gnomoj, princinoj kaj cindrulinoj, pigmeoj kaj gigantoj. La ĉefa diferenciga trajto de tiu ĉi kolekto, disde samspecaj alilandaj, kuŝas precipe en tio ke la rakontoj malpli pritraktas la interrilatojn inter la homa kaj besta regnoj, sed iom pli koncernas la aferojn de la reala mondo kaj la efektiva vivo ol la magia aŭ fantazia. Tamen, pro tio ke la eldonistoj laŭanonce destinis la libron por la "tutmondaj infanoj", oni ne povas ne senti, ke kelkajn situaciojn kaj vortojn la kontrolisto ja povis ellasi, ne malpliigante la sorĉon alportitan de la fabeloj mem. Tute eble, ne plaĉis al la tradukintoj forigi ion ajn el la praformo, kaj tiel ili konservis la originalan tekston en ĝia tuteco.

Koncerne la esperantigon de la fabeloj, ni eble rajtus atendi, ke Amo-Akademio en Nagoja liveros modelan lingvaĵon, precipe kiam ili aparte alcelas la junularon. Povas esti, ke oni devas alkutimiĝi al la japana vortuzado kaj esprimmaniero, sed krom neĝustaj vortoj, foresto de interpunkciaj signoj, la teksto enhavas nombron da malglataĵoj diversspecaj, tiom sintaksaj kaj gramatikaj, kiom rilatas la vortordon, almenaŭ laŭ okcidentaj oreloj, kio entute faras la fabelaron multe pli enhavinteresa ol lingvoinstrua. Domaĝe ke ĉio ĉi detiras de alie belaspekta, lukspapera libreto, kiu entenas multajn kolorajn kaj aliajn bildojn tutpaĝajn — vera fieraĵo de la presarto.

Felix Woolf (Sudafriko)

Kantante tra Pollando, de Roman Dobrzyński kaj Tadeusz Jarzecki. Eld. PEA, Varsovio 1964. 55 p. 17 × 12 cm. Kun muziknotoj. 1,50 gld.*

Rekomendinda verko al scivolemuloj pri poloj kaj ilia patrolando. Tiu ĉi kantaro sendube ludas rolon de gvidlibro pri Pollando, ĉar 22 popolkantoj, lerte tradukitaj kaj muzikaranĝitaj, el diversaj regionoj, reflektas morojn kaj kutimojn, tradiciojn kaj temperamentojn de la loĝantoj. Simpla stilo en tradukoj efike konvenas al popolkantoj. Ankaŭ unu originala kanto estas ĉarma.

Shosaku Isobe (Nagoya)

NOTO

La prezo de "Jen estas helpo por vi" (Vd. "Esperanto" aŭg. 153) estas 0,50 gld. Mendebla ĉe UEA.

Japana kvodlibeto. Originala poezio kaj prozo. Kompilis Tazuo Nakamura kaj Miyamoto masao. Eld. Stafeto, La Laguna, 1965. 127 p. 18 × 12 cm. 4,50 gld. (18 st.) *

En "Esperanta antologio" de Auld nur *unu* japano trovis lokon. En "33 rakontoj" *neniu.* Tamen jam ekzistis materialo valida por inda reprezento. Tion atestas la nuna antologieto, kiu specimenas el la varia kontribuo de dek ok japanoj al nia originala literaturo. Naŭ poetoj kaj naŭ prozistoj. Plejparte pli ol 50-jaraj.

Inter la poetoj konatas la pioniroj K. Ossaka, S. Ito (I.U.) kaj Ŝ. Mijake, aŭtoro de la bela miniaturo "Oktobro". Kun kelketaj esceptoj, tiuj poemoj apartenas al la ornama speco: ili sugestas plaĉan bukedon en ĉambro, ne tiun intiman atmosferon, kiu saturus la tutan domon. Ĉu eble la rimoj impresas tro sintrudaj, iom nenaturaj? Ili preskaŭ misefektas en "Inĝeniero" de T. Hattori. Sukcesis precipe la pecoj, kiuj montras senperan percepton kaj plejan simpligon de esprimo.

Pli specife individuan tonon kaj karakterizajn temojn trovis ĝenerale la prozistoj por diskonigi sian medion kaj stimuli la intereson de nejapanaj legantoj. Lingva eseo de T. Nakamura kaj priversa studo de K. Matuba (Kalocsay en traduko de orientaj poezioj) rivelas rigoran esplormetodon kaj instruajn vidpunktojn. Sur la pure beletra kampo min ravis du noveloj: kun aŭtenta talento K. Nakagaki en "Unu seno" rakontas tagon de mizera pentristo, kaj T. Hasegaŭa (virino) la dramon de maldungito en "Ses monatoj". Ambaŭ favoras fortan socian tendencon kaj sensigas la problemojn de malriĉaj homoj en grandurbo inter la du mondmilitoj. Per unuakta sceno K. Tabata sobre pentras kamparanan tragedion. Rimarkindas la rolo, kiun mono aŭ ties manko ludas en kvar el la kontribuoj, kaj eĉ en la poezie delikata fabelo de S. Kita (ankaŭ virino). "Al kara fratineto" de M. Hukuta memorigas la sinceran manieron de T. Arišima.

Utilajn informojn pri la aŭtoroj oportune provizas serio da biografietoj. Kaj kiel ne admiri la kleran kaj simpatian prezenton de Clelia Conterno Guglielminetti, kiu scias tiel ĉarme diverĝi de kutime akceptitaj opinioj?

Henri Vatré (Svislando)

Esperantistoj estas ni, de Gé Roelofs kaj Lou Visser. Eld. la aŭtoroj, Gerard Callenburgstr. 4 II, Amsterdam (W), Nederlando. Partoj I kaj II, kune 26 p. 22 × 17 cm.

Kantaro kun pionira valoro konsistanta el entute 17 originalaj Esperanto-kantoj. Unu el la aŭtoroj komponis ilin al tekstoj de la alia. Preskaŭ ĉiuj kantoj estas facile kanteblaj eĉ de nemuzikemuloj kvankam en adapto de muzikoj al tekstoj troviĝas kelkaj problemetoj, ne gravaj en tradukitaj kantoj.

Shosaku Isobe (Nagoya)

TRAF-EKZEMPLA GVIDILO PRI STILO

Ne tiel, sed tiel ĉi! Konsilaro pri stilo de F. Faulhaber. Eld. Dansk Esperanto Forlag, Aabyhøj, 1965. 63 p. 20 × 15 cm. 3,95 gld. *

La gvidantoj de Esperanto-kursoj penas instrui la esencon de la lingvo, ĝian gramatikon, ĝian vortaron, kaj ĝenerale la manieron, kiel korekte ĝin skribi kaj paroli. Estas ja ankaŭ programo de tiuj kursoj montri, kiel eviti la transplantadon, en Esperanton, de naciaj esprimmanieroj. Sed mi kredas, ke tre malofte, kaj eble preskaŭ neniam, oni donas instruon pri la stilo. Kompreneble, en kiu ajn lingvo, akiro de bona stilo estas la lasta atingota grado en la alproprigo de la koncerna lingvo. Por Esperanto tute ne ekzistis, miascie, ia gvidilo por tiu celo. La verko de s-ro Faulhaber rimedas al tiu manko.

Klariginte, kio estas stilo, kio *bona* stilo, la aŭtoro revuas en konvenaj ĉapitroj la diversajn stildifektojn, kiujn oni tro ofte renkontas en niaj artikoloj, gazetoj, libroj, ktp.: sonkolizioj, vortripetoj, malbona vortordo, malĝusta frazkcento, manko de klareco aŭ simpleco, ktp. En tiuj ĉapitroj, li ne nur detale klarigas, kio estas la evitindaj formoj, kaj kial ili estas evitindaj, sed li ankaŭ apogas siajn dirojn per tia abundo da trafaj ekzemploj, ke, kiu ne komprenas, tiu prefere ludu per kegloj aŭ sin distru per felietondesegnoj, anstataŭ uzi Esperanton kun kultura pretendo. Se la stildifekton kaŭzas malatento al gramatika regulo, ĉi lastan li klare montras kaj komentas. Ververe bonega verko, kaj necesa, se ne diri: nepre ne malhavebla por progresintaj studantoj.

La lasta ĉapitro, kiu pritraktas la enkondukon de neologismoj, kaj ĉefe de tiuj, kiuj celas anstataŭi la "mal-vortojn", randas la rajton al propra, individua stilo; sed ĉiaokaze ne estas malbone atentigi pri la fakto. Fine, la aŭtoro asertas, kaj prave, ke por akiri stilon, necesas "legi kaj relegi bonstilajn verkojn": ĉu listo de fidindaj aŭtoroj ne estus ja bonvena por orienti niajn studantojn?

Roger Bernard (Francujo)

Rememoru la venkon super la germana faŝismo! de Luo ĵujking. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 36 p. 14 × 9 cm. 0,35 gld. *

Resumo: La ĉefo de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo konkludas, "ke la usona imperiismo nun ludas rolon pli ferocan ol tiu de Hitler". (Artikolo de 10 majo 1965)

Granda venko de Leninismo. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 14 p. 14 × 9 cm. 0,35 gld.*

Resumo: Je la 95-a datreveno de V. I. Lenin, la aŭtoroj diras leninismon plifortigita per lastatempa lukto kontraŭ reviziismo.

Daŭrigu la lukton kontraŭ la reviziismo de Ĥruŝĉov ĝis la fino. Fremdlingva Eld. Pekino 1965. 21 p. 14 × 9 cm. 0,35 gld.*

Resumo: Ĉi tiu artikolo skizas la disvolviĝon de junio 1963 ĝis junio 1965 de la polemiko inter Sovetunio kaj Ĉinujo.

Parolado en Aliarcham Soci-scienca Instituto de Indonezio, de Peng ĝen. Fremdlingva Eld. Pekino 1965. 39 p. 14 × 9 cm. 0,35 gld.*

Resumo: Altranga oficulo de la Komunista Partio de Ĉinujo resume prezentas ĝian tutan nuntempan politikon, precipe rilate al unueca oponado kontraŭ Usono.

La historia sperto de la kontraŭfaŝisma milito. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 33 p. 14 × 9 cm. 0,35 gld. (1,4 st.) *

Resumo: Hardite en la fajro de la dua monda milito, la popoloj de la mondo senkompromise luktu kontraŭ la papera tigro de imperiismo. (Artikolo de 9 majo 1965).

Kelkaj Historiaj Faktoj pri la SERVA CENTRO DE UEA EN ĜENEVO

Okaze de la eldono de n-ro 3, septembro 1965, de la Bulteno de S-ro Hans Jakob, en kiu troviĝas gravaj mispre-zentoj kaj malĝustaĵoj, la Estraro de UEA publikigas dokumenton sub la titolo "Kelkaj Historiaj Faktoj pri la Serva Centro en Ĝenevo". Ĉar S-ro H. Jakob dissendis senpage sian "Bultenon" al nekonata nombro da membroj kaj aliaj personoj, la Centra Oficejo informas ĉiujn membrojn, kiuj ricevis tiun bultenon kaj kiuj deziras sciiĝi pri la fakta stato de la afero, ke ili povas ricevi senpage la menciitan dokumenton de la Estraro. Bv. nur aldoni respondkuponon por la sendkostoj.

M. Vermaas
Direktorino de la C.O.

La nuna situacio kaj niaj taskoj, de Maŭ zedong. Dua eldono, Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 45 p. 15 × 10 cm.

(Vidu "Esperanto" 1963, apr. p. 72).

Historio de Esperanto, de Léon Courtinat. Eld. la aŭtoro, Francujo, 1965. Dua volumo, 1914-1933. Paĝoj 400 ĝis 816. 24 × 16 cm., il. 18,— gld. (72 st.)*

Esperanto, de Sokratis Sakellaropoulos. Eld. Supera Helena Esperanto-Instituto, Athinai, 1965. 70 p. 21 ×14 cm. Historia kaj priskriba verko.*

Elementa legolibro de Esperanto, de Mijake ŝihej. Eld. Japana E-Instituto, Tokio, 1957. Represo de 1963. 20 p. 21 × 15 cm.*

Ilustraĵoj por la Elementa legolibro de Esperanto. Eld. Amo-Akademio. 17 folioj 54 × 39 cm., por klasa uzo.*

Kantoj de sovetaj komponistoj. Kompilis V. Ostroĵnikova kaj L. Guseva. Eld. Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj, Moskvo 1965. 36 p. 21 × 14 cm., ofsetita. 1,50 gld. (6 st.)*

KURSO PER TELEVIDO

Instruas Cseh-metode prof-ino Elvira Fontes
(vidu p. 193, "Brazilo")



TANKAOJ OKCIDENTAJ

Aŭtunfolioj
flirtadas eskapeme
el vintra frosto;
ho, mia kor' tutsame
gapvagu antaŭ rusto!

★

L' akordiono
al amo antaŭludas,
ĉu dumsemajna,
ĉu tute senkondiĉa,
ĝismorte malfeliĉa?

★

Memoro foras
pri trajtoj aŭ la nomo,
sed ŝia lango
veluris mian buŝon
*per sperta sarabando.**

★

El infaneco
neniam resaniĝis
mia povra kor';
eksmondaj la fantomoj
pasas jen en muta ĥor'.

★

Trapasis iu,
glitadis ties paŝoj
en mian solon;
nun sensoniĝas ili
al netroveblaj kaŝoj.

PAUL LOBUT

*) Sarabando: malrapida hispana danco.

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la oktobran numeron.

RADIO BUDAPEST ĉiutage dufoje dissendas sciigojn por aŭstrujaj aŭskultantoj. Ekde la 27-a de septembro, inter 18.00 kaj 18.30 estas disaŭdigata Esperantlingva programo la lastan lundon de ĉiu monato. Pritraktataj temoj: vivo, zorgoj, ĝojoj de la hungara popolo, evoluo de la aŭstraj-hungaraj interrilatoj, informoj pri la preparado de la venontjara 51-a Universala Kongreso kaj pri interesaj eventoj en la hungara Esperanto-movado. La redakcio ĝoje akceptos rimarkojn, proponojn kaj dezirojn de la aŭskultantoj. Adreso: Radio Budapest, Sendung für Oesterreich, Brody S. u. 5/7, Budapest, Hungarujo.

Ondlongoj: 240 m. (1250 kcs), 48 m.10 (6234 kcs).

POLA RADIO en Varsovio nun uzas la jenajn ondlongojn por disaŭdigi sian ĉiutagan programon de 15.30 ĝis 16.00: 200 m. (1502 kcs), 50.42 m. (5950 kcs), 49.96 m. (6005 kcs), 48.90 m. (6135 kcs), 42.11 m. (7125 kcs), 41.99 m. (7145 kcs), 41.18 m. (7285 kcs), 31.45 m. (9540 kcs). Antaŭ la 15-a de novembro estas aranĝata nova konkurso kun premioj sub la titolo: "Pollando okcidenta kaj norda". Regularo estas sendata laŭ peto al Pola Radio.

H.C. ANDERSEN



LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERIESTRO
KAJ ALIAJ FABELOJ

★

numeraj kaj sagaj fabeloj por plenkreskuloj. Luksa libro en granda formato kun multaj koloraj ilustrajoj.

Prezo nur 30 steloj.

Eldonejo Koko – Kolby Kaas
Danlando

Petu la senpagan Koko-revuon.

LAŬLANDE

Brazilo

• Televida kurso de Esperanto, verŝajne la unua en la mondo, okazis en julio en São Paulo, Brazilo, sub respondeco de la Sekretariejo pri Edukado de la Ŝtato S. Paulo. Post 80-minuta intervjuo pri Esperanto la 8-an de julio, dusemajna kurso aperis de 19 ĝis 30 julio en la loka Kanalo 2, de la 18.00 ĝis la 18.25 horo. Intertempe, per Kanalo 5 okazis alia, Cseh-metoda kurso kvartaga. Kursfine kantis en Esperanto konata fabrika ĥoro. La koncernaj televidelsendoj estas videblaj de pluraj milionoj da spektantoj.

• La finon de E-kurso ĉe altlernejo "Fundação Getúlio Vargas" en Rio de Janeiro, per kiu diplomiĝis 78 gelernintoj, markis elstaraj festoj kun partopreno de la japana ambasadoro kaj la unua sekretario de la hinda ambasadorejo.

Britujo

• En la sesa intensa kursaro por instruistoj en Barlaston en aŭgusto prelegis i.a. William Auld pri "Hamleto" kaj Frank Merrick pri kantado en Esperanto. D-ro P. Neergaard gvidis diskuton pri "Homaj kvalitoj en la angla kaj en Esperanto". La tuton organizis Marjorie Boulton.

Bulgarujo

• La 7-an kaj 8-an de aŭgusto 350 personoj el 9 landoj partoprenis Turistan E-Feston sur monto Vitoŝa apud Sofio, kie troviĝas montodomo nomita "Esperanto". Okazis ekspozicio "Esperanto kaj la internacia turismo".

Germanujo

• En orienta Berlino ekaperos 24-paĝa parte nacilingva Esperanto-bulteno. En 1966 la eldonejo "Enzyklopädie" en Leipzig verŝajne eldonos lernolibron kaj vortaron, kaj en aprilo okazos kurso por E-instruistoj en la centra lernejo de la Germana Kulturligo en Oybin. (Rap. F. Tischer).

• S-ro Hans Koch, vic-delegito de UEA kaj direktoro de Germana E-Instituto, ricevis la ŝtatan ordenon "Verdienstkreuz am Bande" pro siaj meritoj por Esperanto.

Hungarujo

• Tria Internacia Pedagogia Seminario okazos de 10 ĝis 20 aŭgusto 1966, kun prelegoj pri la lingvo, metodiko, literaturo kaj movadhistorio. Informas: Pedagogia Grupo de HEA, Szeged, Április 4 u. 1.

Japanujo

• En sufiĉe konata monata literatura revuo "Vikingo" aperas felietone biografia romano "Zamenhof" de s-ro Itoo en Kioto.

Nederlando

• En la fino de septembro okazis elstara jubilea kongreso pro la 60-jara ekzisto de la landa asocio L.E.E.N. Glata organizo aparte karakterizis la kongreson, ĉe kiu pli ol 100 partoprenantoj povis aŭskulti plurajn prelegojn, i.a. de la ĝenerala sekretario de UEA, kaj ĝui diversajn distrajn aranĝojn.

• Post Amsterdam, Groningen kaj Deventer nun jam ankaŭ en Rotterdam Esperanto estas instruata en instruista seminario. Dek kvin triajaraj studentoj de Protestanta Seminario jam komencis la kurson.

Nov-Zelando

• La Asocio por Unuiĝintaj Nacioj, en sia jarkunveno 1965, rezoluciis por la starigo de "komisiono pri internacia lingvo" kiel fakorganizaĵo de U.N., kaj por instruado de internacia lingvo en ĉiuj duagradaj lernejoj.

Svislando

• La 13-an de junio en La Chaux-de-Fonds okazis la inaŭguro de "Centro Edmond Privat", en ĉeesto de s-ino Privat.

• De 26/12 ĝis 4/1 1965-6 okazos en Adelboden, Svislando, la 9-a Internacia Ski-Restado. Detale informas: s-ino A. Gacond, Miéville 133, 2314 La Sagne.

LAŬFAKE

Blinduloj

• Sukcese pasis la Internacia Renkontiĝo de Blindaj Esperantistoj de 8 ĝis 20 aŭg. en Gwatt, Svislando. 50 blinduloj el 12 landoj ĝuis ekskursajn aranĝojn, artajn programerojn kaj ŝakturniron. LIBE okazigis du ĝeneralkunvenojn. Laŭ raporto la nova eldono de "Lingvaj Respondoj" aperos ankaŭ brajle.

Federismo

• Aperis la unua, 16-paĝa eldono de "Eŭropo", multobligita revueto pri eŭropa federismo. Red. Dick Andree, Balistr. 77, Den Haag, Nederlando. Admin. S. A. Europa Een, Prins Boudewijnlaan 323, Wilrijk, Belgujo, poŝta ĉekkonto 6159.31. Jarabono kostas 3,60 gld.

Geografio

• La kvinan Internacian Geografian Semajnon en Jelenia Góra, Pollando, partoprenis 127 personoj. Ĝi vekis grandan interesiĝon ĉe la ekstera publiko kaj gazetaro.

Kolektado

• Katalogo pri E-poŝtmarkoj aperas dum 1965 kun detala priskribo de aspekto, okazo, dentumo, eldonkvanto, artisto, ktp. en "La glumarkkolektanto", membrogazeto de EKIK (Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo). Informas: I. Paulsson, Algatan 3, Solna 2, Svedujo.

Literaturo

• En anglalingva libro "Pollando omaĝas al Shakespeare", ĉi-jare eldonita en Varsovio, aperis artikolo pri tradukoj kaj prezentoj de Shakespeare en Esperanto.

Radio

• Ĉi-jare ekfunkciis internacia radioelsendo de la Madagaskara Radio, ĉiutage de 16.00 ĝis 17.00 GMT je 19 metroj. Ĝis nun ĉiuj elsendoj estas en la angla aŭ franca lingvo. Eble efikus, se la direktoro ricevus aerpoŝtajn sugestojn pri aldono de elsendoj en Esperanto. Adreso: Radiodiffusion Malgache (Chaîne internationale), B.P. 442, Tananarive.



La nova Esperanto-monumento en Linz *(vd. aŭgusto p. 160)*

KION LEGANTOJ SKRIBIS

Kotizoj kaj individuaj membroj

Mi zorge studis la raporton de la aprila kunsido de la Estraro de UEA. Mi vidas, ke la ekonomio estas granda problemo, kaj ke la nombro de individuaj membroj estas nur malgranda. Persone mi opinias, ke la ĉefa kaŭzo de tio estas la alta kotizo, ekzemple por MA: 20 gld. Eble la Estraro diros, ke tiu kotizo estas malalta, sed oni devas memori, ke ni havas ankaŭ aliajn elspezojn, ni estas membroj de aliaj organizaĵoj, niaj infanoj havas ankaŭ kotizojn por pagi, ktp., ktp. Por eventuale ebligi redukton en tiu kotizo, mi proponas, ke la Jarlibro aperu nur ĉiun duan, eventuale eĉ ĉiun trian jaron.

Elna Matland
Sauda, Norvegujo, 7 aŭg. 65

En Sofio en 1963 la Komitato de UEA frontis la alternativon, ĉu redukti la elspezojn (ekz. per malplioftigo de eldonaĵoj) aŭ altigi la kotizojn. Ĝi decidis altigi la kotizojn.

Jam nun, por eviti deficiton en 1966, necesas mil pliaj individuaj membroj. Ĉu redukto de la kotizo per maloftigo de la Jarlibro vere allogus tiujn bezonatajn aliĝontojn? Evidente la Komitato opinias, ke ne. *Red.*

Ĉu instrui antikvajn lingvojn?

En la julia numero de la revuo vi traktis la interesan temon: "Ĉu plu instrui la antikvajn lingvojn?" Mi menciu, ke mi laŭprofesie estas filologo kaj studis latinan kaj helenan lingvojn.

Estas fakto, ke por kompreni plej amplekse kaj profunde la strukturon de iu eŭropa lingvo plej bone taŭgas profunda studo de klasikaj lingvoj. Sed ni studas ilin ne nur pro lingvaj problemoj; la klasikaj lingvoj fakte havigas al la studanto kulturajn valorojn, kiuj ne estas anstataŭigeblaj per la studado de iu ajn alia lingvo. Krom tio, la studado de niaj antikvaj lingvoj en unika maniero lertigas la penskapablon kaj formas kaj klerigas la tutan homon. Antikvaj lingvoj kaj Esperanto en la nuna tempo havas tute diversajn taskojn. Ambaŭ estas necesaj kaj meritas, ke oni profunde studadu ilin.

Harry Wilke
Berlin, 15 aŭg. 65
(Letero tre koncizigita. - Red.)

Ludiloj kaj literoftecoj

Ĉu vi scias, kie oni povas akiri Esperantan "Scrabble"-ludilon aŭ similan? Se ne ekzistas tia ludilo, kie oni povas akiri liston de la Esperantaj literoj ordigitaj laŭ ofteco kaj laŭ procenta uzado?

John Davis
College Park, Usono, 25 sept. 65

La angla ludilo "Scrabble" (speco de krucvorta ludo per literpecoj sur tabulo) ne ekzistas en Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj aperis simila ludilo "Lexicon", kiu konsistis el kartoj kun Esperantaj literoj, sed ĝi nun ne estas aĉetebla. Por improvizi tiajn ludilojn necesas scii la oftecojn de la Esperantaj literoj, prefere iliajn oftecojn en vortaro. Laŭ nia scio, tia statistiko ne estas ankoraŭ farita, sed jen (laŭ nepublikigita statistiko pri preskaŭ 12 000 literoj) iliaj procentaj oftecoj en ordinara prozo:

a	13,0	g	1,2	k	4,5	s	5,5
b	1,0	ĝ	0,7	l	6,5	ŝ	0,3
c	1,1	h	0,4	m	2,6	t	5,3
ĉ	0,5	ĥ	0,0	n	7,7	u	3,1
d	3,2	i	9,0	o	8,7	ŭ	0,6
e	9,2	j	4,0	p	2,8	v	1,8
f	0,9	ĵ	0,1	r	5,9	z	0,4

JOSÉ EZQUERRA-BERGÉS

La 17-an de aŭgusto je la aĝo de 85 jaroj mortis en Barcelona (Hispanujo) s-ro José Ezquerra-Bergés, fondinto de la Nacia Blindula Organizaĵo en Hispanujo. Li publikigis brajlajn E-gramatikojn kaj aliajn verkojn en la Internacia Lingvo.

ALBERT E. BOYCE

La 31-an de julio mortis en Londono s-ro A. E. Boyce, multjara membro kaj Delegito de UEA en Bristol, Britujo.

JOSEPH PINON

S-ro Joseph Pion, Delegito de UEA en Sartrouville de post 1945, forpasis en Sallanches, Francujo, je 23 aŭg. 1965, en sia 78-a jaro.

ĈE LA TOMBO DE HIDEO YAGI

El ĵurnalo "Sanyo-Shimbun", Okayama:

Post la ĉeesto de la Universala Kongreso, kiu okazis en Tokio, 30 eksterlandanoj vojaĝantaj al Kansai-distrikto por turismo, survoje al Hirošima, vizitis la tombejon Aminohama en Okayama, kie d-ro Yagi, eksprezidanto de UEA kaj eksrektoro de Okayama-Universitato, dormas eterne. Gvidata de s-ro Douglas Murphy, brito, la grupo konsistis el geesperantistoj eŭropaj, kiuj ĉiuj intime konis d-ron Yagi. Bonvenigite de s-ro Fujio Yagi (35), filo de la forpasinto, kaj s-ino Akashi Yagi (62), edzino de la forpasinto, ĉe la tombo, s-ro Murphy laŭdis lian laboron dediĉitan al disvastigo de Esperanto, lingvo internacia, kaj oferis bukedojn preĝante por la ripozo de la animo."

El letero de s-ro Fujio Yagi, Okayama 31.8.65:

"... Estis granda plezuro por mi kaj por la familio Yagi, ke vi kaj via grupo esperantista vizitis al la tombo de mia patro .... Mi kaj mia patrino ne povos forgesi eterne vian saluton faritan antaŭ la tombo ..."

51-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO
Budapest, 30.VII - 6.VIII.1966

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 Rotterdam, 6-an de okt. 1965

Kotizoj

La aliĝkotizoj validaj ĝis la 31-a de dec. 1965 estas jenaj:

	gld.	ft.
Kongresano	55,—	360
Edz(in)o	27,50	180
Junulo malpli ol 20-jara	21,—	140
Universitata Studento	34,—	225
Blindulo	27,50	180

La kotizo kaj la aliĝilo devas esti senditaj samtempe al la sama instanco. Aliĝiloj, pagitaj laŭ la supremenciita kotiztabelo, kiuj atingos la adresojn de la Kongreso aŭ de la Kongresaj Perantoj post la 31-a de dec., *ne estos traktitaj.*

Unua Bulteno

La 8-paĝa Unua Bulteno kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la Landaj Asocioj kaj Ĉefdelegitoj de UEA, ĉe la Kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Glumarko

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto. Prezo: 0,40 ned. gld. (1,60 st.) por 10-glumarka folio.

Foto-Konkurso

En la kadro de la 51-a U.K. okazos la 5-a Internacia Foto-Konkurso. Temo: "Infanoj ne konas limojn". Oni rajtas partopreni en la Konkurso per nigrablankaj fotoj (nelimigita kvanto) kaj por diapozitivoj (maksimume 5). Pliaj detaloj kaj informoj pri la premioj en venontaj komunikoj.

Statistiko (ĝis 4.10.1965)

Arg. 1, Aŭstral. 1, Belg. 5, Braz. 2, Brit. 12, Bulg. 6, Danl. 3, Finnl. 2, Franc. 21, Germ. 7, Hisp. 2, Hongkongo 1, Hung. 16, Isr. 2, Ital. 5, Jap. 8, Jug. 7, Monako 2, Ned. 11, Norv. 2, Nov-Zel. 1, Poll. 4, Sved. 8, Svis. 2, U.A.R. 1, U.Ŝ.A. 8. Entute 142 el 26 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

BELARTAJ KONKURSOJ 1966

UEA denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 51-a Universala Kongreso partopreni la Belartajn Konkursojn. La kompleta, reviziita regularo de la Konkursoj aperis en la Jarlibro 1965/I, p. 132-4. Nepre ĉiuj konkursontoj atente tralegu la regularon, precipe la artikolojn 1 kaj 2.

Kiel en la lastaj jaroj, la ĉijaraj branĉoj estas jenaj: 1. Originala poezio; 2. Tradukita poezio; 3. Originala prozo; 4. Originala drameto (por sceneja prezento aŭ por radio).

Ĉiujn konkursaĵojn kun la aldonaĵoj laŭ la regularo oni sendu al la Sekretariino de la Belartaj Konkursoj: **s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio.** La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas **la 31-a de marto 1966.**

La valoroj de la premioj estas difinitaj jene: por 1-a premio, 100 gld.; por 2-a premio, 70 gld.; por 3-a premio, 40 gld.; por la premio "Nova Talento", 70 gld. Krome, la nomo de la "Nova Talento" estos engravurita sur la nova pokalo Henry Harabagiu.

Oni aparte petas, ke konkursantoj, kiuj tradukas verkojn de nemulte konataj aŭtoroj, aldonu al la konkursa traduko koncizajn biografiajn-kritikajn notojn pri la aŭtoro. Tiujn notojn oni poste utiligos okaze de eventuala publikigo de la traduko.

MEMORIGA KALENDARO

Decembro
3-5 Meksika Kong., Meksiko-Tenochtitlan
10 Tago de Homaj Rajtoj
15 Zamenhof-Tago, Tago de la Libro
26-4/1 Int. skiferioj Adelboden, Svisl.
27-2/1 Int. Sem. GEJ, Hamburg, Germanujo
31 Kongreskotizoj Budapest plialtiĝas

Januaro
2-8 Aŭstralia Kongreso, Canberra
6-10 Nov-Zelanda Kongreso, Palmerston N.

Februaro
19-26 Unua Int. Skisemajno Krimml, Aŭstrujo
26-5/3 Dua Int. Skisemajno en Krimml

Marto
31 Limdato Belartaj Konkursoj 1966
Kongreskotizoj Budapest plialtiĝas

Aprilo
14-16 Int. Junulara Seminario, Toruń, Poll.
30 Limdato kandidatiĝo, Int. Ekzameno

Majo
27-30 Brita Kongreso, Norwich
Dana Kongreso, Kopenhago
Konga Kongreso, Leopoldville



EL LA 21-a IJK EN OOTU

Supre: la cervoj de Nara pacience eltenis la karesojn de la ekskursantoj. Dekstre: Kenji Naemura venkis en la Oratora Konkurso.

LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

Kontribuo de TEJO al la Jaro de Internacia Kunlaboro: la seminario pri lingvaj problemoj

La seminario pri lingvaj problemoj, kiu okazis en Podvin, kastelo norde de Ljubljana, Jugoslavio, de 6 ĝis 10 septembro, estas menciita nur neofte (kompare kun aranĝoj kiel la UK kaj la Kongreso de TEJO) en la paĝoj de la Revuo Esperanto. Ne mirinde: ĝi estis ja esence **ne**-esperantista aranĝo, destinita ĉefe por ne-esperantistaj junularaj organizoj (ĵargone: NEJOj). Dum tuta jaro la NEJO-komisiono de TEJO, sub gvido de Humphrey Tonkin, preparis ĝin, kaj precipe Svobodan Zlatnar, helpate de stabo de samurbaninoj, laboris en la lastaj monatoj por sukcesigi ĝian surlokan organizon.

El la 15 NEJOj, kiuj antaŭe anoncis sian partoprenon, finfine partoprenis nur deko, inkluzive de tri "EJOj": STELO, SEL, kaj TEJO mem. La aliaj estis la Anne-Frank-Fondaĵo, la Internacia Instituto por la Paco, la Internacio de Militrezistantoj, la Studenta Movado por Unuiĝintaj Nacioj, la Asocio de Laborantoj por neadaptiĝantaj infanoj, la Junularo Mondfederalista, kaj la Monda Universitata Servo. Tiu modesta nombro tamen tute ne respegulas la kvaliton de la laboro. La delegitoj pritraktis kaj diskutis ne malpli ol 16 labordokumentojn, el kiuj granda parto estis tre valora kaj ampleksa. Estis por diversaj ĉeestantaj esperantistoj la unua fojo, ke ili spertis mem la sistemon de samtempa interpretado. La kvar junaj, neprofesiaj interpretistoj, kiuj ŝvite kaj merite reproduktis ĉion diritan en la angla, franca aŭ esperanto, eligis apartan laŭdon. Menciinde estas tamen, ke malgraŭ ilia ege laciga kaj streĉa laboro, la interpretado tamen devigis al malrapida kaj iom nenature nespontanea diskutado. Esperantistoj, kutimiĝintaj al rapidaj rimarkoj „flugantaj de loko al loko", daŭre ricevis riproĉojn pro troa elokvento. Same menciinde, ke la sendrata instalaĵo, impona sendilo kaj malpezaj aŭskultiloj, kune kun iom malpli impona teknikisto, foruzis grandan parton de la kotizoj kaj subvencioj por la seminario.

Plej bonan, koncizan ideon pri la "serioza" laboro donas la gazetara bulteno eldonita fine de la seminario. Estas neeble ĉi tie reprodukti eĉ parton el la materialo (ĉio farita en tri lingvoj), kiel la referaĵoj, la konkludoj, aŭ la gazetarbultenoj, eldonitaj dufoje dum la aranĝo. Certe tamen validas la aserto, ke la modestaj laborfortoj kaj rimedoj de TEJO, kaj la limigita nombro da interesiĝantaj NEJOj ellaboris kiel eble plej kvalitan finrezulton.

"Finrezulto" cetere estas neĝusta vorto. La NEJO-komisiono daŭrigas sian laboron komencitan (la seminario estis nur ero el ĝia programo), kaj esperas atingi ĉiam pli ĝustan komprenon pri la lingva problemo kaj ĝiaj solvoj, ĉe la estraroj kaj membroj de la NEJOj. La konkludoj de la seminario estas por tio fidinda fundamento.

La kvara tago.

Kvankam iom nekonforme al la biblia rekomendo, la kvara tago estis destinita ripoza tago. Ĝi interrompis la laboron, anticipante la finan tagon de konkludoj.

La "ripozo" konsistis el granda, sed interesega ekskurso. Ĝi kombinis turistajn kaj kulturajn klimaksojn kun interesaj renkontiĝoj kaj akceptoj. La vizito al fabriko de kaŭĉukaĵoj finiĝis per renkontiĝo kun la prezidantoj de la fabrika junularo. Dum plena horo ili respondadis al lavango da viglaj demandoj, tuŝantaj la vivon de la junaj produktistoj en la fabriko.

La societo por Unuiĝintaj Nacioj de la urbo Ljubljana (kun kiu la loka Esperanto-klubo kulturas imitindajn rilatojn de kunlaboro) akceptis la seminarianojn en siaj luksaj apartamentoj, sed la tagon kronis sendube la oficiala akcepto en la urbodomo de Ljubljana, fare de la Prezidanto de la Centra Komitato de la Unio de la Slovena Junularo, Tone Florjančič.

Entute tago, kiu ŝuldigis multan dankon al Zlatnar. Same kiel la aliaj.

H.B.

ALTNIVELA KAJ VARIA AGADO DE SSES "VELA PEEVA"

La Sofia Studenta E-ista Societo "V.Peeva" jam daŭre ĝojigas per sia entuziasma kaj fruktodona E-agado. Elkreskinta el societo kun 31 membroj en 1963, nun SSES "V.Peeva" havas pli ol 95 membrojn – aktivajn gestudentojn el la superaj lernejoj de la ĉefurbo. Sub sperta gvidado de la estraro kaj modela anticipa planado de la aktivado la societo fariĝis evidente unu el la plej aktivaj en la lando, ankaŭ tutmonde. La vastampleksa kaj sekvinde matura agado de la Sofiaj gestudentoj-esperantistoj tion nerefuteble pruvis.

Post la sukcesa partopreno en la brila VI-a Tutlanda E-ista Junulara Festivalo en Dimitrovgrad kaj originale belaspekta reprezentiĝo en la manifestacio de la 1-a de majo, SSES "V.Peeva" ĉiujn fortojn dediĉas al kolektado de subskriboj – ĝis nun ĝi transdonis al la kancelario de BEA 14 000, el kiuj 5000 kolektivaj. Oni planis atingi ciferon de 30 000 - 35 000 individuaj subskriboj, tasko akompanata de vasta informado pri la UN-kampanjo kaj la movado.

Okaze de la 1-a de majo kaj la 24-a de majo – Tutslava Festo de la klerigo kaj la kulturo – la societo prezentis riĉan koncerton

antaŭ la Sofia esperantistaro kaj aranĝis majvesperon kun junulara balo. La kolektita sumo de la lasta estis donacita por finarango de la montodomo "Esperanto". En la programoj partoprenis la Estrada Ensemblo de la societo kun gvidanto Vladimir Dimitrov, la Esperanto-Kvinopo "Suda Flamo" – "Bufosinĥronistoj" kun gvidanto Dimitr Jdrakov, laŭreatoj-studentoj de la VI-a TEJF.

Okazis ankaŭ du koncertoj de Ĥristo Ĝekov kaj Petr Aleksiev (pri klasika voĉa muziko) el la verkoj de Händel, Verdi, Beethoven, Mozart, Ĉajkovski, P. Ĥadjiev, Haydn, Schubert, P. Vladigerov ... Pro ĉi tiuj plenaj je majstreco kaj anima ĝuo koncertoj de niaj membroj, ambaŭ kantistoj akiris novan rekonon kaj aŭtoritaton inter vasta neesperantista publiko, por la studenta E-societo en Sofio.

Prelegvojaĝojn kaj partoprenon en la Scienca STELO-Sesio en Budapest dum aprilo faris nia vicprezidanto Bojidar Leonov kaj Lalo Stojkov. La societo havas regulajn kontaktojn kun 24 eksterlandaj E-kluboj (studentaj kaj junularaj). Ĝi okazigas ĉiusemajnajn kunvenojn kun riĉaj programoj. La centra studenta gazeto jam kelkfoje publikigis artikolojn pri la aktivecoj de SSES "V.Peeva", sciigis faktojn pri STELO, TEJO kaj Esperanto ĝenerale.

Tri kursoj samtempe

Jus finiĝis tri kursoj ĉe la societo: por komencantoj, por progresintoj kaj por instruistoj. Novaj freŝaj fortoj kaj kapabluloj instrui la lingvon eniris nian membraron. Fliiĝas la nombro de alilandaj studentoj-esperantistoj inter ni, kiuj poste estos bonaj disvastigantoj de Esperanto en siaj malproksimaj landoj en ĉiuj partoj de la mondo.

Komence de la studjaro 1965/66 ekagos Sciencotraduka kaj Esplora Sekcio ĉe la societo sub gvidado de asistanto Tonko Tonkov. Post la juniaj ekzamenoj sekvis partopreno en la somera laborbrigado de BEJ, la Seminario ĉe la Nigra Maro (Primorsko) kaj E-arangoj en Pollando, Hungarujo, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio k.a. Jam komenciĝis preparado por la VII-a Festivalo de BEJ en la printempo de 1966.

En la jaro 1965 – Jaro de Internacia Kunlaboro – kaj enkadre de la granda kampanjo „1965 – Jaro de la Bulgara Esperantista Junularo" la Sofiaj gestudentoj-esperantistoj fruktoplene kontribuas al la movado novajn atingojn kaj agadas por plua digna disvolviĝo de Esperanto en la lando.

Moiz Bangura

(studento en Sofio el Gvineo, kunlaboranto de Bulgara Esperanto-Junularo)

Parto de la 62 gestudentoj, kiuj dum la pasinta lernojaro studis Esperanton en oficiala kurso de la Sofia Universitato "Kliment Oĥridski". La oficiala lektoro de Esperanto en tiu universitato estas s-ro Kûnĉo Vâlev.

LA 22-a TEJO-KONGRESO KONTURIĜAS

Pécs, Hungarujo.

La Loka Kongresa Komitato amike invitas la Esperantistan Junularon pasigi la sekvajn somerajn ferioj en nia urbo, situanta sur la sudaj deklivoj de la monto "Misina" (elp.: Miŝina), en la suda parto de Hungarujo.

Ĉu vin, karaj amikoj kaj amikinoj, interesas la antikvaĵoj? Pécs estis jam konata urbo dum la romia epoko, sub la nomo "Sopianae"; ni povas certigi vin ke vi povos kontentigi vian sciavidon per la vizitadoj de la multnombraj muzeoj kaj postrestaĵoj, inter kiuj estas famekonata la katakombo el la IV-a jarcento.

Eble vi preferas la ekskursojn? Sur la ombroplenaj promenad-vojetoj de la montaro "Mecsek" (elp.: Meĉek) vi povos forpeli viajn zorgojn kaj trovos kvietan refreŝiĝon en la multaj belaj ekskursejoj, el kiuj kelkaj estas vizitotaj de ni kolektive, kiel ekz. elvida turo sur Misina, ebenaĵo Tettye, ktp.

Se vi ŝatas la dancejojn, jaz - kaj cigan-muzikon, - dum la Interkonatiĝa Vespero kaj la Adiaŭa Balo vi ĉiujn ĉi povos ĝui en la tre modernaj kaj elegantaj salonoj de la Restoracio Olimpia.

Jes, dum la Kongreso vi povos trovi gajajn amuziĝojn kaj seriozajn okupadojn, tute laŭ via plaĉo! Unu afero estas certa: ne nur la junularo, sed la tuta gastama loĝantaro kaj la aŭtoritatuloj de la urbo kore invitas kaj atendas vin, kaj ni promesas fari nian plejeblon por tiel akcepti kaj gastigi vin, ke la semajno pasigita ĉi tie estu neforgesebla por ĉiam !

Aliĝo: La aliĝilon oni sendu rekte al la korespondadreso.

Kotizoj:	antaŭ 1.4.66	post 1.4.66
malpli ol 20-jaraj:	21 US dolaroj	23 US dolaroj
20 jaraj kaj pli:	23 US dolaroj	25 US dolaroj
nemembroj de TEJO:	25 US dolaroj	27 US dolaroj

Oni pagu la kotizon al nia bankĉekkonto, aŭ en Usonaj dolaroj, aŭ en aliaj valutoj egalvaloraj. La aliĝilo estos pritraktita nur post ricevo de la kotizo.

Bankĉekkonto: Magyar Nemzeti Bank OTP. PECS 635-803.

Korespondadreso: TEJO-kongreso, p.f. 114, PECS, Hungarujo.

Vilmos Benczik pm. prezidanto. — Jozsef Deak pm. sekretario.



GRAVA ATENTIGO

Sur poŝtmandatoj aŭ aliaj pagiloj direktitaj al la Centra Oficejo la sendantoj bonvolu ĉiam indiki la celon de la pago, eĉ se ili ankaŭ aparte skribas pri tio. Ĉiu pagilo havas apartan spacon por tiaj informoj. Precizaj indikoj aŭ referenco pri letero multe helpas la rapidan plenumon de la mendoj.

DELEGITOJ

Argentino

Esperanza (Santa Fe) 20 000
D: S-ro Luis Sebastián Bonvin Melano, studento pri ekonomio, Nicolás Schneider 1740; tel. EPRZ 1881.

Moreno FCDFS (Buenos Aires) 30 000
D: S-ro Homero C. Otheguy, industria ĥemiisto, Avda. Libertad 655.

Aŭstrujo

3812 **Gross-Siegharts** (Niederösterreich) 2 600
FD (Kortbesto-bredado): S-ro Rudolf Zimmermann, polic-oficisto, N-ro 518; tel. 171.
FD (Radiofonio amatora — OE 3 RU): S-ro Rudolf Bartosch, em. fotisto, Bahnhofstr. 24

Linz/Donau. FD (Dentotekniko): S-ro Karl Tischler, dentoteknikisto, Kaplanhofstr. 1.

Wien 2. FD (Naturismo): S-ro Karl Mascha, Friedensgasse 4/6; tel. 72 40 985.

Belgujo

Bruxelles-Brussel. FD (Bankaj aferoj): vakas,
Lokeren. D & FD (Vegetarismo): vakas.

Brazilo

Americana. D: vakas.
Belo Horizonte. JD: vakas.
Cruzeiro. D: vakas.
Curitiba. JD: vakas.
Curvelo. D & FD (3): vakas.
Ibirací. D: vakas.
Natal. D, VD & FD: vakas.
Potirendaba (São Paulo) 12 000
D: F-ino Maria Rosa De Angelis, bibliotekstino, Rua Cp. José Oliva 471.
Recife. FD (Elektrotekniko): S-ro José Rabello de Paula, elektroteknika inĝeniero, Rua do Amazonas, 162 (Esquina da Rua Tomé Gibson).
Rio de Janeiro. FD (Astronomio & Kalkulsistemo dozena): vakas.
Salvador. FD (Tramtrafiko): vakas.
São Paulo. FD (Lingvoj: portugala): S-ro Helmuth Schenk, ŝtatoficisto, Posta-Restante, São Paulo-1.
Votuporanga. D & FD (Instruado): vakas.

Britujo

Leeds. FD (Komerco): vakas.
Leigh-on-Sea. FD: vakas.
London. FD (Komerco: ŝipoj): vakas.
Nottingham. FD (Asekurado): vakas.
Ruislip. D: vakas.

Ĉeĥoslovakio

Šumperk (Morava) 27 000
FD (Edukado): S-ro Jos. V. Otta, fakinstruisto, Nerudova 32; tel. Esperanto 4373.
FD (SOS-aŭto-servo): la FD (Edukado).
FD (Turismo): la FD (Edukado).

Danujo

Kolding. FD (Filatelo): vakas.

Finnlando

Joensuu. VD: vakas.
Lahti. D: vakas.
Lappeenranta. FD (Oficistaj aferoj): vakas.
Outokumpu. FD (Instruado): vakas.
Peräseinäjoki. D. vakas.
Runni. D: vakas.
Teuva. D: vakas.
Vääksy. VD: vakas.

Francujo

Angers. FD (Religio: katolikismo): vakas.
Ay Champagne. VD: vakas.
Charleville. D: vakas.
Lyon. JD: vakas.
Sarreguemines. D: vakas.
Sartrouville. D & FD: vakas.

Germanujo

Düsseldorf. FD (Aŭtomobil-riparo GM kaj Opel): S-ro Erich Klotz, aŭtomobil-lakisto, 4 Düsseldorf-Nord, Scheffelstr. 35.
Edenkoben. D & FD:vakas.
6606 **Gersweiler**/Neu Aschbach (Saar) 9 000
D: S-ro Jakob Schenkel, inĝeniero-emerito, Am Ziegelhof 30.
Gummersbach. D: vakas.
Hamburg. FD (Studentaj aferoj): vakas.
Hangelar. FD: vakas.
Markgröningen. D & FD: vakas.
Neu-Aschbach. D: vakas.
567 **Opladen** (Rheinland) 37 000
D: S-ro Hans Georg Strauss, domfarbisto, Reuschenbergerstr. 31.
Osnabrück. FD: vakas.
Rheydt. FD: vakas.

Grekujo

Patras. FD: vakas.

Hispanujo

Barcelona. FD (Muziko): vakas.
Madrid. FD (Farmacio): vakas.
Tarrasa. FD (Turismo): vakas.

Hungarujo

Dunaujváros. D: S-ro István Sztankó, elektroteknikisto, Bocskai utca. 2.II.2.
FD (Pacmovado): vakas.

Italujo

Avenza. FD: vakas.
Bologna. FD (Modo) & (Muziko): vakas.
Firenze. FD (Literaturo): vakas.
Genova. FD (Komerco): vakas.
Livorno. D & FD (2): vakas.
Menfi. D: vakas.
Milano. VD & FD (Antikvaĵoj) & FD (Vin-Komerco): vakas.
Varese. VD: vakas.

Jugoslavio

Beograd. FD (Turismo): vakas.
Celje. D & FD (Metiistaj aferoj): vakas.
Kalinovac. FD: vakas.
Sevnica. D: vakas.
Split. VD & FD (Kolorigado) & FD (Tekniko): vakas.

Kubo

Camagüey (Camagüey) 200 000
D: S-ro Raúl Juárez-Sedeño, kontisto, Apartado 570.

Madagaskaro

Tananarive. FD: vakas.

Meksiko

México. FD (Filatelo): vakas.

Nederlando

Amersfoort. D: vakas.
Arnhem. JD: S-ro E.D.O. Woessink, studento, Vondellaan 47; tel. 21256.
Den Haag, FD (Instruado) & (Komerco): vakas.
Eindhoven. FD (Ornitologio): la D.

Norvegujo

Bardu (Troms) 2 000
D: S-ro Vidar Vik, pastoro, Boks 445, Setermoen; tel. Setermoen 542 aŭ 721.
Oslo. JD & FD (Muziko) & (Religio): vakas.
Stavanger. D: vakas.
Tromsø. VD: vakas.
Trondheim. FD (Fervojoj): vakas.

Nov-Zelando

Lower Hutt. VD: vakas.
Matamata. D: vakas.
Tauranga. FD. (Florkulturo): vakas.

Pollando

Goleniów. D & FD: vakas.

Portugalujo

Horta. D: vakas.
Lisboa. FD (Arĥitekturo): vakas.
Sacavém. FD: vakas.
Santarém. D & FD: vakas.

Sovetunio

Ĉelabinsk. D: vakas.
Moskva. FD (Botaniko): vakas.
Riga. D: S-ro Kârlis Dzintars, pensiulo, Riga 39, str. Unijas 83-8.

Svedujo

Gävle. FD (Industrio: lakto): S-ro Gunnar Cronqvist, laktejestro, Vretvägen 9 D, Gävle 3; tel. 192093.
Karlshamn. D: vakas.
Stockholm. FD (Edukado: metia): S-ro Harry Eklund, instruisto, Iskanegränd 8 II, Hägersten; tel. 08/469084.
Surte. D: vakas.

Svislando

Langenthal. JD & FD (Ceramiko): vakas.

Turkujo

Bursa. D: vakas.
Eskiŝehir. D: Vakas.

Usono

Baltimore. FD: vakas.
Burlingame. VD & FD: vakas.
Homewood. D: vakas.
Meadville. JD: vakas.
New York. JD: vakas.
Pacific Palisades. D & FD (Muziko): vakas.
Pittsburgh. D: vakas.
Redwood City. D & FD: vakas.
San Antonio. D: vakas.
Springfield. D & FD: vakas.
Trenton. VD: vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

De Diego, s-ro Oscar, Lima, Peruo.
Ford, s-ro H.L., Cleveland, Ohio, Usono.
Stuit, f-ino Marie-Anna. Arras, Francujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

360 Freitas, s-ro A. Wantuil de, Brazilo; 361 Koivuniemi, f-ino Helmi, Finnlando; 362 Wiltshire, s-ro Arthur G., Nov-Zelando; 363 Antunes, s-ro J., 364 Serra, d-ro Pedro, Portugalujo; 365 Olsson, s-ro Sigurd, Svedujo.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Britujo: Williams, s-ro Norman, 4,99. Francujo: Grupo de Chatenay-Malabry, 32,-; Vincent, s-ino J., 35,—. Germanujo: Treude, s-ro W., 3,—; Zerbe, s-ino G., 21,—. Japanujo: Sumiyosi, s-ro K., 5,—; Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 20,—. Nov-Zelando: King, s-ro W. H., 2,—. Portugalujo: Freitas, s-ro M., 19,05.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Nederlando: Cate, s-ro H. J. ten, 5,—; Termaat, f-ino F. P., 30,—.

Kanado: Henderson, s-ino D., 3338,60.

Sumo entute ricevita:	20 971,79 gld.
Sumo elspezita:	17 996,99 gld.
Saldo pozitiva:	2 974,80 gld.

Kiel oni vidas, la pozitiva saldo de la fondaĵo Por Vastigo de la Agado ŝuldiĝas ĉimonate plejparte al tre granda kaj grandanima donaco de s-ino Henderson en Kanado. Al ŝi ni aparte kore dankas! Samtempe ni esperas, ke ŝia ekzemplo decidigos ankaŭ aliajn donacontojn al ĉi tiu tre grava kaj aktuala konto.

FONDAĴO CANUTO

Germanujo: Schönrich, s-ro K., 2 MA. Kanado: Moisley, s-ino M. C., 3 MA, 1 J-MA. Nederlando: Otto, f-ino E.S., 1 MA, 1 MJ, 1 J-MA; Vries, s-ro A. de, 1 MA. Norvegujo: Raimar, s-ro T., 6 MA, 1 J-MJ.

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. Ekde tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1965

(Vidu "Esperanto", majo, p. 94)

A. (16,— gld.): 21. Cadenel, s-ro F.; 22. Feneyrol, s-ro M.; 23. Laverenne, s-ro M.; 24. Salles, s-ro M.; 25. Stuit, s-ro S., Francujo; 26. Slot, s-ro R., Nederlando; 27. Madsen, s-ro L., Norvegujo; 28. Braun, d-ro A., Svislando.

B. (5,— gld.): 4. Perra, f-ino G.; 5. Tavernier, s-ro R., Francujo; 6. Hirsch, s-ino A.; 7. Schorcht, s-ro A., Germanujo.

FONDAĴO JUNULARA GAZETO (Gld.)

Francujo: Feneyrol, s-ro M., 54,—; Salles, s-ro M., 54,—. Germanujo: Hölscher, s-ro E., 2,01; Wessel, s-ino L., 1,96. Nederlando: Baas, s-ro P.W., 25,—; Termaat, f-ino F.P., 10,—.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO (Gld.)

Nederlando: Termaat, f-ino F. P., 10,—. Germanujo: Treude, d-ro Wilhelm, 97,46 (Amiko de Hinda E-Instituto).

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Geonkloj Esperantistaj estas plenkreskuloj kiuj korespondas en Esperanto kun infanoj. Detalojn: Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

30-jara Fraŭlo, oficisto, deziras korespondi kun geamikoj ĝis 35-j. el Monako, Greklando, Skandinavio, Okcident-Eŭropo, Ameriko, Azio, Afriko. Respondo garantiata. Nikola Golič, Trojstvo, Hrvatska, Jugoslavio.

Deziras interŝanĝi stampitajn pm. kun ĉiuj landoj: Alfred Mayer, Zeppelinstr. Nr. 35; 75 Karlsruhe, Germanujo.

En ĉiuj landoj mi serĉas filatelistojn por interŝanĝi poŝtmarkojn. Koresp. ĉeĥe, germane, angle, france kaj en Esperanto. Pavel Dobiáš, Markova 1111, Frenštát p.R. Ĉeĥoslovakujo.

Poŝtmarkoj. Mi volas akiri Esperanto-poŝtmarkojn. Katalogo Yvert. Uzitajn kaj ne-uzitajn. Aŭstrujo 770, 838, Braz. 299, 311, 315, 333, 423, 691; Aerp. 47; Bulg. 547, 895, 995, 1152, 1193. Ĉeĥosl. 1179. Hung. 1494; Aerp. 192, 193. Jugosl. 638; Aerp. 48; Polujo: 976, 977. Rus. 338, 339, 357, 358, 381, 382, 408, 408a, 411, 455, 455a, 455b, 456. Triesto (B) 86; Aerp. 20. A.W. Withoos, Th. à Kempisstraat 46-II, Amsterdam-16, Nederl.

Kunlaborantoj petataj el ĉiuj landoj por interŝanĝi unutagajn kovertojn (dek aŭ pli) aŭ kontraŭ belaj hindaj poŝtmarkoj; reciproka rekompenco laŭbezone. Esperanta Filatela Servo, P.O. Box 604, New Delhi, Hindujo.

Specimena foiro de Barcelono. La Delegito de UEA en Barcelono, antaŭ la neebleco respondi al ĉiu delegito kiu kvitancis kaj informis lin pri la ricevo kaj elmontro de la afiŝoj pri la foiro, esprimas al ĉiuj sian dankon kaj anoncas ke por la estonta jaro denove estos sendata la afiŝo al ili pli frue ol en la nuna jaro.

Fariĝu radio-amatoro! ESPERANTO en la etero estas moderna vojo praktike uzi Esperanton kaj per tio helpi antaŭenpuŝi nian aferon. OE3RU, Radio-amatoro esperantista, Gr. Siegharts/Aŭstrujo.

Ekspozicio en Lourenço Marques, Afriko. Por montri la utilecon kaj uzon de Esperanto en scienco, literaturo kaj turismo, ni aranĝos en Decembro ekspozicion ĉe intelektulara societo. Bv. sendi gazetojn, afiŝojn, prospektojn kaj alian taŭgan materialon. Al ĉiuj ni sendos belafrankitan pk. Adreso: M. Raposo, c.p. 872, Lourenço Marques, Mozambiko.

Nia Esperanto-rondo festos dum Januaro 1966 sian 10-jaran jubileon kaj intencas tiuokaze aranĝi ekspozicion de esperantaĵoj kaj letervesperon. Skribu al Pola Esp.-Asocio, Filio en Opole, ul. Strzelców Bytomskich 8, Opole, Pollando.

Atentu Rumanujo. Mi deziras kontaktiĝi kun samideanoj el via lando, ĉefe kun Bukurestanoj. Francisco Alafont Thomasa, Alcalá 108, Madrido (9), Hispanujo.

Magnetofone kaj letere deziras korespondi E. Perevertajlo, (27-jara laboristo), ul. Ĉeĥova 6, Jangi-Jul, Uzbekistano, Sovetunio.

F-ino Wanda Janina Knobloch (27-jara inĝenierino pri nutraĵ-industrio), Wrocław, str. Stalowa 73/9, Pollando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Bonvolu noti: S-ino Doris M. Worcester ĉimonate forveturos de Japanujo. Ne skribu leterojn. Revenos Anglujon marton 1966.

Eddy Borsboom translokiĝis la 1-an de oktobro 1965 al Germanujo. Lia adreso estas: E. Borsboom, Weiherhaldenstr. 13-1 — bei Frau Welsch — 7401 Tübingen-Lustnau, Germanujo.

S-ro Walter Lagger, Postfach 24, A-6022 Innsbruck, Aŭstrujo, nur povas kor. per PI, afranko skribflanke.

Akademio. Nova adreso de la Prezidanto: Prof. G. Waringhien, 182-G Avenue Rouget de Lisle, Vitry-sur-Seine, Francujo.

Pri ĝardenkulturo, agrokulturo, sporto, turismo kaj multe pli deziras korespondi 21-jara ĉeĥa junulo: Stanislav Kares, Polst cp 47, p. Miletin, okres Jicin, Ĉeĥoslovakujo.

Lorcan OhUiginn (Delegito en Dublin, Irlando dum 20 jaroj) atentigas, ke li translokiĝis al Kanado kaj lia nuna adreso estas: Esperanto Services, 85 Sparks Street 215, Ottawa 4, Ontario, Kanado.

Sincera servo: Ĉu vi deziras aĉeti ion el Hong Kong, la paradizo de fremdlandaj aĉetantoj, aŭ ĉu vi deziras vojaĝi al Hong Kong? Se jes, bonvolu skribi al LUN FUNG TRADING CO., P.O. Box 3612, Sheungwan, Hong Kong kun respond-kupono aer-poŝta. Ni ĉiam estas pretaj servi al vi tre fidele. Nia servo kontentigos vin ĉiuflanke, kaj la serv-kotizoj estos al vi tre favoraj.

Poŝtstampa Katalogo 1965: Kompleta sistema priskribo laŭ landoj kaj datoj de la oficialaj E-poŝtstampoj, tre utila por kolektantoj kaj interesa por ĉiu esperantisto, eldonita de EKIK (Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo), prezo 10 rkp. I. Paulsson, Algatan 3, Solna 2, Svedujo. Petu senkoste informojn pri EKIK, ĝia enhavoriĉa membrogazeto kaj la Stampa kaj Glumarka Banko. Unuopa numero de la gazeto 3 rkp.

Objektiva vivkoncepto ne povas esti kontraŭa al scienco. Ĝia bazo nepre estas faktoj kaj scienca pensado. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Ĵus aperis

H. C. ANDERSEN

"FABELOJ"

(1-a volumo)

Traduko de D-ro L. L. Zamenhof
53 originalaj ilustraĵoj de A. Uniechowski

238-paĝa eleganta eldono kun trikolora ŝirmkovrilo. Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon validan por aĉeto de la eldonota 2-a volumo.

Sendante al sia libroservo la rabatkuponon entenitan en la 4-a volumo de "Fabeloj" oni ricevos rabaton de 0,30 us. $.

Prezo: 3 us. $ (+ 10% por sendokostoj)

Liveras la naciaj libro-servoj kaj la Libro-Servo de UEA.
Eldonis: "Heroldo de Esperanto", 13 rue de la Reinette-Pippelingstr., Bruselo 1

UZU LA JIK-GLUMARKOJN

Prezo: 0,40 gld.
(1rpk.) por unu
folio (10 markoj)

KAJ

VARBU

SUBSKRIBOJN !

Kiu interesiĝas pri la

EKUMENA MOVADO

de la kristanaj eklezioj, nepre legu la jus aperintan broŝuron:

La Vojoj de la Eklezio

(Encikliko de Papo Paŭlo VI)

Prezo: 3,50 ned. gld. (sv.fr. 4,20) + 10% sendkostoj
Mendu kun antaŭpago per poŝtmandato ĉe: Ekumena Esperanto, 9106 Zürchersmühle/Urnäsch Svislando

---

EL LA VIVO DE
LUDOVIKO ZAMENHOF

de Gösta Henriksson

Legolibreto por novaj esperantistoj pri la junaĝaj jaroj de Zamenhof. La konciza prezentado kaj simpla lingvo donos eblecon trastudi la libreton dum parto de studsezono kaj doni al la lernantoj la personan fonon de la ekesto de la lingvo Esperanto..
Prezo: gld. 2,—

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo. **ELDONA SOCIETO ESPERANTO**

HEROLDO
DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 45 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 19 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA jarabono: 4 $ (55 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska